



ESPERANTO

NOVEMBRO 1962

55 a Jaro - N-ro 684 (11)

esperanto

NOVEMBRO 1962

5 5 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 684 - (11)

Fondinto : H. HODLER

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1962) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en pli ol 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, H. P. Olsens Vaenge 37, Taastrup, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

"Kion vi deziras ĉi tie, en la Danakila Dezerto?" (vd. p. 190).

Enhavo

Altigi la membronombro	189
Karavano de amikeco tra Afriko	190
Virina konferenco konsideras Esperanton	194
Spertoj pri la Internacia Diplomo	195
Grava eldonaĵo de "Philips"	196
Edukada eksperimento en Anglujo	196

Rubrikoj

Novaj libroj	197
Nia forumo	198
Radio kaj TV Babiladoj	199
La Internaciaj Konkursoj	199
Ŝaka rubriko	200
CED	200
La Juna Vivo	201
Ricevita libro	202
Tra la mondo	202
Esperantista vivo & Nekrologo	203
48a U.K.	204
Oficiala informilo	204

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

ALTIGI LA MEMBRONOMBRO

La Dua Baza Laborplano de U.E.A., akceptita unuanime de la Komitato en Kopenhago post tre vasta kaj profunda diskuto, antaŭvidas, interalie, la altigon de la membronombro sur ĉiuj niveloj: loka, landa kaj monda. Fine de la pasinta jaro U.E.A. havis entute 30.750 membrojn en 88 landoj, kompare kun 30.185 en 1960. El tio 23.473 estis asociaj membroj (A.M.) kaj 7.277 individuaj de diversaj kategorioj. La Laborplano celas altigi la nombron de A.M. al minimume 35.000 kaj tiun de individuaj membroj al 15.000.

Aparte dependaj unu de la alia estas la punktoj 5, 12 kaj 13 de la Laborplano en la eroj, kiuj rilatas la nombran kreskon de la membraro. Kiel konate, dank' al celtrafa laboro de U.E.A., la nombro de ĝiaj membroj pli ol duobligis en kelkaj jaroj, sed estas evidente ke plia rimarkinda grandiĝo ne estas ebla, se samtempe ne kreskas nombre ankaŭ la landaj asocioj kaj la lokaj grupoj.

Ĉu la celo de la menciitaj eroj de la Laborplano estas atingebla, aŭ ĝi estas nur fantazia revo?

Antaŭ ol respondi al la demando necesas unuavice akcenti, ke la nombro de la organizitaj esperantistoj estas pli granda ol la nombro de ĉiuj membroj de U.E.A. Dudeko da fakaj kaj specialiĝitaj organizaĵoj estas ligitaj al U.E.A. ĉu per aliĝo ĉu per apartaj kontraktoj. La membroj de tiuj organizaĵoj ne estas enkalkulitaj en la supraj ciferoj. Sendube, parto de iliaj membroj estas samtempe individuaj membroj aŭ almenaŭ A.M. de U.E.A., sed tutcerte konsiderinda nombro da membroj de la fakaj kaj aliaj organizaĵoj apartenantaj al U.E.A., ne troviĝas en la listo de la U.E.A. membroj. Aliflanke, kelkaj landaj asocioj havas pli da membroj ol ili povas anonci al U.E.A. kiel A.M. Plej ofte tio okazas pro la financa situacio de la koncerna landa asocio aŭ pro valutaj malfacilaĵoj. Fine, ekster la kadro de U.E.A. troviĝas S.A.T. kaj sufiĉe granda nombro da grupoj kaj grupetoj, kiuj apartenas al neniu landa aŭ faka organizaĵo. La nombro de ĉiuj esperantistoj organizitaj, sed ne apartenantaj al U.E.A., verŝajne estas inter 15.000 kaj 20.000, tiel ke sen troigo oni povas diri, ke la tuta nombro de organizitaj esperantistoj hodiaŭ atingas aŭ eĉ superas 50.000. Necesos, ke ĉiuj aliĝintaj landaj asocioj esploru plej atente la eblecojn altiri ĉiujn esperanto-grupojn sur sia teritorio, komuniki al U.E.A. la efektivan nombron de ĉiuj membroj kaj pagi por ili la minimuman kotizon de A.M. (25 ned. cendoj, kio estas malpli ol eksterlanda afranko de letero!), insiste peti la landajn aŭtoritatojn pri permeso sendi la kotizojn al la C.O., se ĝis nun ne estis eble tion fari. Aliflanke, estos necese, ke ĉiuj organizaĵoj kaj ĉiuj unuopuloj instigu la esperantistaron aliĝi al U.E.A. kiel individuaj membroj.

Neniu precize scias kiom da personoj parolas

hodiaŭ la Internacian Lingvon. Se oni kalkulas ilin laŭ la nombro de venditaj ekzempleroj de diversaj lernolibroj, inkluzive la ŝlosilojn, estus pluraj milionoj! Tia kalkulo estus erara, ĉar multaj aĉetas lernolibron, kiun ili neniam malfermas, aŭ kiun ili nur supraĵe trarigardas, sed ne ellernas la lingvon. La alia ekstremo estus kalkuli kiel esperantistojn nur tiujn, kiuj estas organizitaj. Ankaŭ tio estus granda eraro. La vero verŝajne troviĝas inter la du, ĉar la spertoj montras ke proksimume 5% de la tuta esperantistaro estas organizitaj. La aliaj aŭ neniam apartenis al kiu ajn organizaĵo, aŭ ekŝiĝis, forgesis renovigi sian kotizon, aŭ pro aliaj kaŭzoj malaperis el la vicoj de la organizita Esperanto-Movado. Ĉiu, kiu regule portas la insignon — kaj bedaŭrinde multaj ankoraŭ ne portas ĝin malgraŭ pluraj alvokoj — povis mem konstati kiom da fojoj li aŭ ŝi estis alparolita en bona Esperanto de persono apartenanta al neniu organizaĵo. Ekzistas eĉ familioj, en kiuj la lingvo estas uzata kiel hejma, sed la familianoj tute ne estas organizitaj esperantistoj. La listoj de membroj de ĉiuj niaj organizaĵoj klare montras, ke ĉiujare aliĝas novaj anoj, sed ĉiujare ankaŭ perdiĝas malnovaj. *La vera problemo ne estas aligi novajn membrojn, sed malebligi la perdojn ĝis maksimumo.* Por atingi tion ekzistas nur unu vere efika rimedo: vastigi kaj intensigi la agadon, plibonigi kvalite la laboron, indiki la celojn kaj prezenti klare la metodojn por ilin atingi. La kaŭzoj de forfalo de la membroj estas multnombraj, sed la ĉefa estas manko de perspektivoj, tial seniluziigoj kaj senkuraĝiigoj. Por doni novan inspiron la unua paŝo estas verki laborplanon laŭ la modelo de la dua Baza Laborplano de U.E.A., vaste diskonigi ĝin inter la membraro de la koncerna organizaĵo kaj peti subtenon de ĉiu membro. Samtempe oni devus sendi la Laborplanon de la koncerna organizaĵo, kune kun la Laborplano de U.E.A. kaj taŭga akompana letero, al ĉiuj iamaj membroj instigante ilin realiĝi kaj petante ankaŭ ilin helpi la novan agadon. Se la laborplano estos realeca kaj se la akompana letero objekte prezentos la gravecon de la altigo de la membronombro por la plenumo de la plano, la eĥo ne povas foresti: se ne ĉiuj, do almenaŭ multaj realiĝos.

La intensigo de la informado kaj la vastigo de la instruado plifaciligos la aligon de novaj esperantistoj, kiuj lernos la lingvon en tiu ĉi jaro. Estas konsilinde aligi ilin al niaj organizaĵoj sur la tri niveloj kiel eble plej baldaŭ.

Nenio en la Laborplano de U.E.A. estas revo. Ĉio estas realigebla. Ankaŭ la altigo de la membronombro. Necesas nur bona volo, fido, laboro kaj persisto!

I. L.

Karavano de Amikeco tra Afriko

La 9-an de marto 1962 ekveturis el Beogrado la KARAVANO de AMIKECO, kun la intenco iom post iom traveturi laŭeble plej grandan nombron da landoj de Afriko. Nun, post kvinmonata vojaĝado mi sentas la bezonon informi la tutmondajn esperantistajn geamikojn pri nia vojaĝo kaj agoj.

Jam almenaŭ unu jaron antaŭ la ekvojaĝo mi komencis la preparojn por tiu ĉi entrepreno, pro diversaj kialoj. **Unue**, mi jam vizitis la plejmulton da landoj Eŭropaj, Amerikaj kaj Aziaj. Laŭ natura sekvo, Afriko staris en la vico atendante min. Sed tiu ĉi estas nur tute persona kialo. Multe pli grave, kaj **due**, en la nuna momento, kiam multaj novaj ŝtatoj ekestis en Afriko, kaj aperis en la panoramo de la politika, ekonomia kaj kultura vivo de la mondo, ŝajnis al mi urĝega tasko kontribui laŭeble plej multon al la kreado de amikecaj rilatoj

inter afrikanoj kaj neafrikanoj, pere de plej vasta diskonigado de faktoj pri la naturo, la homoj kaj iliaj atingoj en tiu vasta kontinento. **Trie**, kiel esperantisto, mi decidis, ke jam ne sufiĉas bedaŭri la foreston de Afriko el nia Movado, kaj paroli pri tiu fakto. Alvenis la momento por ekagi. Kaj antaŭ ol ekagi plenforte, iu el la aktivuloj nepre devas konatiĝi kun la faktoj pri tiuj landoj, iliaj popoloj, lingvoj, problemoj.

Ekde la komenco mi staris antaŭ du grandaj taskoj. Kunmeti la ekspedicion tiel, ke ĝi enhavu la plej konvenajn personojn. Sufiĉajn por plenumi la grandan taskon, sed eĉ ne unu homo plua pli-grandigu niajn elspezojn. Tiu estis la unua tasko. La dua estis atingi la monrimedojn por plenumi la entreprenon. Tiuj du problemoj estis, kompreneble, forte ligitaj unu al la alia.

La unua problemo, post longaj korespondaj diskutoj, trovis sian solvon. Kvankam mia intenco estis varbi la membrojn de la Karavano inter esperantistoj de laŭeble plej multaj landoj, en tio mi ne tute sukcesis. Tamen, kvar el la ok membroj estas esperantistoj: krom mi, s-ano Hans Grossmann el Zurigo, Svislando — la plej juna membro de la grupo — fariĝis ekonomo de la ekspedicio; d-ro Olgierd Baniewicz nia kuracisto, kaj Mag. Ing. Jerzy Knabe nia meĥanikisto, ambaŭ el Varsovio, estas esperantistoj. Mia malnova konatino kaj komencantino en Esperanto, f-ino Jo Munitz el Cardiff, Britujo, fariĝis la sekretario de la ekspedicio. La ceteraj tri membroj estas



La Karavano de Amikeco en Luksor, Egiptujo. De maldekstre dekstren: Tibor Sekelj, Jo Munitz, Hans Grossmann, Olgierd Baniewicz, Jovan Aleksiĉ, Dragiša Stevanović, Branko Marjanović kaj Jerzy Knabe.

jugoslavo: Jovan Aleksiĉ, radio-ĵurnalisto estas mia plurjara kunlaboranto, kaj en tiu ĉi entrepreno li fariĝis mia kunorganizanto. La du filmistoj, Branko Marjanoviĉ el la Jugoslavia Filmnovaĵ-entrepreno kaj Dragiŝa el la Beograda Televido, aliĝis kiel senditoj de siaj respektivaj entreprenoj. Post kvinmonata laboro tiu ĉi lasta devis reiri hejmen pro malbona sanstato. Tiel anstataŭ ok ni restis sep, ĝuste kiel okazis al la dek negridoj en certa momento.

La financaj malfacilaĵoj estis pli grandaj. La sumoj ricevitaj antaŭpage por nia laboro de televido, radio kaj tuta ĉeno da ĵurnaloj ne estis sufiĉaj por starti. Ni prunteprenis sufiĉe grandan sumon, kaj sekuris certajn enspezojn pro nia estonta laboro. Tiuj enspezoj, kune kun la helpo de diversaj registaroj afrikaj interesitaj pri nia laboro, devus sufiĉi por nia vojaĝo.

Ni aĉetis en Britujo fortan veturilon "Land-rover" kun postveturilo, kaj la jugoslavia fabriko "Zastava" disponigis al ni sian fortan terenon veturilon kun speciale aranĝita postveturilo, provecele. De diversaj institucioj de Jugoslavio ni havigis tri bonajn magnetofonojn, du filmilojn — unu 35 mm-an kaj unu 16 mm-an — kun abunda kvanto da filmstrioj. Diversaj fabrikoj kontribuis medikamentojn, la svisa horloĝfabriko "Enicar" disponigis al ni 16 siajn produktaĵojn, kaj jugoslavia konzervo-fabriko "Crvena Zvezda" abundan kvanton da konzervoj.

Fine, sub la aŭspicoj de la Internacia Geografa Asocio, kiu decidis adopti nin, ni ekveturis. La oficiala lingvo de la ekspedicio estas Esperanto.

Rapide ni traveturis *Jugoslavion* kaj *Bulgarujon*. Nur en Sofio ni renkontis esperantiston, kiu bonvenigis nin oficiale. En *Istanbulo* deko da esperantistoj kunvenis por bonvenigi nin en la sama hotelo, en kiu iam APO fondis la tiean Esperanto Societon.

En la interno de *Turkujo* ni vizitis la mirindajn valojn de Urgup, kaj mi denove admiris la milojn da ŝtonturoj en kies multegaj artefaritaj kavernoj iam loĝis tuta popolo da religiuloj.

Sirion ni rapide traveturis, ĝustatempe por eviti politikajn malfacilaĵojn. La unuan iom pli longan halton ni faris en *Libano*. Tie ni ne nur vizitis dumil jarojn aĝan cedron kaj aliajn vidindaĵojn. En Bejruto la esperantistoj, iamaj lernantoj de d-ro Neergaard, organizis bonan kunvenon en la Amerika Universitato, kie mi prelegis pri la Internacia Lingvo. La rezulto estis, ke kvardeko da personoj enskribiĝis en E.-kurson, kiun ekgvidis f-ino Elsie Parson, malnova kunlaborantino de APO. Ŝi tiucele kunveturis kun nia ekspedicio ekde



La vojoj de la karavano ne ĉiam estis glataj.

Anglujo. Tie ŝi restis, kaj verŝajne ankoraŭ laboras por Esperanto, instruante kaj fortigante la tiean grupon.

En Bejruto mi estis la unuan fojon. En ĝi pleje impresis min la trafiko. La stratoj ŝajnas eterna vetkurejo de miloj da aŭtomobiloj, kiuj ĉirkaŭiras unu la alian jen dekstre jen maldekstre, klopodante havi ne pli ol po unu akcidento tage. Ni ĉiuj ok ekspediciuloj estas ŝoforoj, sed en tiu urbo ni preferis vojaĝi per taksio.

De Bejruto al Aleksandrio ni ŝipveturis. *Egiptujo* estis do nia unua lando en Afriko. Kairo, la ĉiam alloga "pordo de Oriento" ankaŭ nun bone akceptis nin. Muzeo de antikvaĵoj, piramidoj kaj Sfingo, je kiu mi enamiĝis unuavide, antaŭ kelkaj jaroj! Sed ankaŭ akcepto en diversaj altrangaj ŝtataj institucioj, en kiuj mi havis multajn okazojn paroli pri la komuna lingvo de nia internacia Karavano.

La rektoro de grava universitato Eiŝam, kaj la dekanato de ĝia "Arta fakultato" konsentis enkonduki Esperanton en la programon de tiu fakultato, kiam taŭga instruanto prezentiĝos.

Survoje suden, antaŭ ni kuŝis la larĝa brun-kolora serpentumanta Nilo. Ne vane diris jam Herodoto, ke Egiptujo estas donaco de Nilo. La loĝebla Egiptujo estas nur mallarĝa strio ambaŭflanke de la riverego. Komence tiu strio estas larĝa kelkajn kilometrojn, poste centojn kaj fine nur dekojn da metroj. Sur tiu teritorio la vivo intense pulsas. Kameloj, azenoj, viroj, virinoj, infanoj, ĉiu kun sia ŝarĝego aŭ ŝarĝeto kuras tien kaj reen. Per diversaj metodoj, pli antikvaj ol modernaj, oni klopodas akvumi la terenon el Nilo, same kiel antaŭ kvin jarmiloj.

Ni vizitas Luksor. La Valo de Reĝoj kaj la

U.E.A. finance subtenas la Karavanon; vi finance subtenu U.E.A. !

templo de reĝino Hatĉepsut restas neforgeseblaj. Ankaŭ la urbo kie la bela Nefertiti regis, meritis nian respektoplenan viziton.

En Asŭano ni navigis per boato inter strangaj rondaj nigraj rokoj por atingi la subtile simplan maŭzoleon de Aga Kan, la mortinta religia ĉefo de la Ismailianoj. La blanka granitkonstruaĵo fiere superrigardas la regionon, kiun la mundana amanto de ĉevalvetkuroj nomis "la plej ĉarma en la mondo".

Nur kelkajn kilometrojn for de la urbo sepcent homoj laboras je la konstruado de la Asŭana digo, kiu estos la plej granda tiuspeca konstruaĵo en la mondo. Ĝi estos fundamento de la estonta evoluo de Egiptujo.



La akvofalo Tisabaj, tuj post la naskiĝo de Blunilo, ĉe Lago Tana, en Etiopio.

De tie antaŭen ne ekzistas vojo. Ni estas devigataj enŝipigi niajn veturilojn sur besttransporta ŝipo, kaj de ĝi admiri la grandiozan templon de Ramzesio II en Abu Simbel, enĉizitan en rokon. Ĝin oni levos 60 metrojn super ĝia nuna pozicio, por ke la vasta artefarita Asŭana lago ne pereigu ĝin. Ĝi estas la plej grava el la "Nubiaj trezoroj", en kies savado partoprenas multaj nacioj, je alvoko de UNESKO.

Ni elŝipiĝas en Ŭadi Halfa, jam sur teritorio de Sudano. Por atingi la ĉefurbon, Kartumon, de tie ni devas transiri mil kilometrojn da dezerto. Por tio ni bezonas apartan permeson de la registaro. Ni atendas tri tagojn, sed ne tute neaktive.

Tiun tempon ni pasigas en vilaĝo dekon da kilometroj for, studante la tribon Maĝarab. Ĝi en multaj aferoj distingiĝas de la ceteraj Nuboj, kiuj ĉirkaŭas ilin: laŭ haŭtkoloro ili estas pli helaj, malsamaj laŭ staturo, kaj multaj moroj, kaj eĉ ilia lingvo enhavas multajn vortojn ne kompreneblajn por aliaj Nubianoj. Ne estas stranga tio, ĉar laŭ la historio tiu popolo venis tien el Bosnio aŭ Hungarujo, aŭ eĉ pli verŝajne el ambaŭ, laŭ ordono de la Sultano Selim II, en 1517, por defendi la imperion. Post la bone plenumita tasko la Sultano donacis al ili insulon sur Nilo, kie ili loĝis ĝis antaŭ kelkaj jaroj, miksiĝante kun la loka loĝantaro nur kiom estis nepre necese.

La transiro de la dezerto daŭris du semajnojn, kaj estis vere granda aventuro. Sen vojoj, tie kaj jene ni vidis malnovan spuron de veturilo. La sola regulo estis, ne ellasi el rigardo la telegrafstangojn, kiuj en la malproksimo reflektiĝis en la fatamorgano. Multfoje niaj veturiloj dronis ĝisakse en la sablon. Tiam ni devis malŝarĝi ilin, puŝi, puŝegi, ŝviti kaj sakri ĝis la dezerto decidis liberigi la veturilojn.

Kartumo estas la plej soifa urbo kiun mi iam vizitis. Pri ĝi mi ĉiam memoros kun seka buŝo kaj dezirego fortrinki barelojn da glacia oranĝado.

Tie ni estis gastoj de la Edukministro. Kun li kaj la helpministro mi havis interesajn diskutojn pri la lingva problemo de Afriko. Ankaŭ en pluraj aliaj rondoj mi havis okazon pledi por Esperanto.

Mi ne havas rajtigon de UEA entrepreni seriozajn klopodojn ĉe konvenaj aŭtoritatoj, kaj tiel mi limigas min al nuraj "hazardaj" diskutoj, kie la okazo prezentiĝas. Tamen la morala kaj materia stimuloj de UEA helpas en la plenumado de tiu laboro.

Nia vojo gvidis nin orienten, unue tra larĝa stepo, kiu post du-tri tagoj transformiĝis en savanon, kun etaj torturitaj arboj kaj alta herbo. Tie kaj jene ni renkontis nomadojn, ĉu en iliaj vilaĝoj, ĉu vojaĝantaj kun siaj familioj kaj tutaj havaĵoj ŝarĝitaj sur kameloj.

Ekde la komenco tiu popolo interesis nin, kaj ni pasigis iom da tempo kun ili. Hadendoa estas la nomo de tiu tribo, sed ankaŭ algluiĝis al ili la nomo, kiun Kipling donis al ili: "Fazi-ŭazi" (Fuzzy-wuzzy) en angla signifas "harhirtulo", kaj li certe havis bonan kialon por tiel titoli ilin. La Hadenooj per aparta ligna forketo konstante laboras por levi rulaĵojn de siaj hararoj, dum la resto pendas ĉirkaŭe en multaj etaj plektaĵoj, ŝmiritaj per kamelfekaĵo. Ili ĉiam portas kun si longan glavon kaj etan kurban jataganon. Cefe ili nutras sin per lakto, kaj la centoj da longkornaj brutoj, kiujn ili posedas, ne estas uzataj por alia afero, ol por plialtigi la prestiĝon de la posedanto.

Ĉe la limo el kabano eliris homo, kaj skribis sur papereton la numerojn de niaj veturiloj, kaj la kvanton da personoj en ili vojaĝantaj. Post tio ni troviĝis en *Etiopio*.

En tiu lando ni restis plenajn tri monatojn, por plenumi diversajn kontraktojn kun la ministerioj kiuj nin subvenciis. Kaj ankaŭ ĉar ni trovis tiun landon tre interesa, kaj ne sufiĉe konata.

Adis Abebo mem estas stranga urbo. Ĝia centro estas malgranda, sed ĝi etendiĝas multajn kilometrojn ĉiufланke. Belegaj modernaj konstruaĵoj kaj palacoj alternas kun pajlsegmentaj kabanoj kaj malplenaj grundoj.

Dum unu monato ni rondvojaĝis tra la nordo de Etiopio, Interalie ni pasis sur vojo, kiu sur la mapo estas indikita kiel "nepasebla, danĝera, neebla". Kaj preskaŭ tia ĝi estis.

Kelkajn tagojn ni pasigis sur Lago Tana, el kiu elfluas Blunilo, kaj vizitis ĝian belegan akvofalon Tisabaj, kiu certe iam fariĝos grava turisma allogaĵo. La urbo Gondar, iama ĉefurbo de la lando, ankoraŭ prezentas al la vizitanto multajn belegajn kastelojn el la 17-a jarcento. En tiu sama urbo ekzistas Esperanto-Societo, sub la gvidado de la ĉina d-ro Han, kiu afable organizis kunvenon de dudeko da samideanoj, al kiu mi parolis pri nia vojaĝo, kaj la Movado.

Ni vizitis Aksum, la iaman ĉefurbon de la Reĝino de Ŝeba, de kies kunesto kun reĝo Salomono rezultis la nuna imperiestra dinastio, laŭ etiopa legendo. Ankoraŭ nun obeliskoj kaj aliaj antikvaj konstruaĵoj abundas en tiu urbo.

Asmara estas moderna itala urbo, kaj Masaŭa unu el la plej varmaj havenoj sur Ruĝa Maro. Mezvoje inter ili armitaj banditoj atakis nian

grupon, senkonsidere al la nomo "Karavano de Amikeco". Ili pafilbatis nin kaj ŝtelis nian monon, fotilojn, horloĝojn kaj... malhelajn okulvitrojn. Tiu ĉi okazaĵo estis ekster programo, kaj la plej emocia parto de nia vojaĝo. Honore al la etiopia polico mi diru, ke nur ses horojn poste policpatrolo vundis kaj kaptis la banditestron, kaj retrovis ĉe li kelkajn el niaj aĵoj. Du tagojn poste ni vizitis lin en hospitalo, kie li kuŝis ĉenita al la lito.

Sur la monto Debre Damo troviĝas monaĥejo fondita en la 6-a jarcento, kun 300 monaĥoj. Por atingi ĝin, ni devis grimpi per ŝnuro apud roko 22 metrojn supren. Kaj tie ni trovis mondon el iu pasinta epoko, kun antikvaj libregoj sur pergamenoj, malnovaj moroj, elmodiĝintaj ideoj.

Pli sude ni eniris en Danakilan Dezerton, por konatiĝi kun la Danakilanoj nomataj ankaŭ Afar. Tiu tribo estas tre danĝera. Kiam la viro volas edziĝi, li devas katri alian viron, por alporti la trofeon al la fianĉino, kiel pruvo de sia kuraĝo. Kiam ni estis kun ili, ni ankoraŭ ne sciis pri tiu kutimo, kaj tute naive eniradis en iliajn kabanojn. Sed feliĉe, sukcesis eviti ian ajn incidenton.

En tiu dezerto ni vidis multajn strutojn. En aliaj lokoj grandajn grupojn da simioj, gazelojn kaj diversajn strangajn birdojn. Dumnokte ĉirkaŭ niaj tendoj ofte ŝakaloj hurlis kaj hienoj ridegis, per sia harhirtiga rido.

En Adis Abebo mi faris du prelegojn pri Esperanto, kies sekvo estas, ke tiel en la Universitata kolegio, kiel en la Junulara Kristana Asocio ekde septembro kursoj estos gvidataj. Gvidos ilin pastro Mikaelo Makonnen, kiu ĉijare partoprenis UK-on.

Pli orienten ni vojaĝis, kaj hieraŭ eniris *Somalion*. Oficialuloj venis al la limo por ekcepti nin, kaj la popolo de la landlima vilaĝo en vicoj staris svingante per verdaj branĉoj je nia honoro. Nuntempe ni loĝas en la registara palaco en Hargeisa, kiel gastoj, ĝis pluaj instrukcioj.

Niaj pluaj planoj? Unu monaton ni intencas restadi en tiu ĉi lando, poste same en Kenjo, eble Madagaskaro (se ni havos monon por la ŝipveturo), Rodezio, Ruando, Burundo kaj Ugando. Tie finiĝos la unua etapo de nia afrika vojaĝo, verŝajne en majo 1963. Post unujara paŭzo ni intencas viziti la landojn de Okcidenta Afriko.

Ĝis nun ni filmis ĉ. 5.000 metrojn da filmo, uzotajn por diversaj edukaj kaj dokumentaj filmoj; surbendigis centon da kantoj, por niaj radio-programoj; mi verkis ĉ. kvindek artikolojn, el kiuj eble fariĝos libro, kaj kolektis 80 etnologiajn objektojn por muzeo. Ankaŭ multegaj homoj de Afriko, elstaraj kaj komunaj eksciis pri Esperanto, multaj eĉ eklernis ĝin.

Tial pri la ĝisnunaj rezultoj de la KARAVANO DE AMIKECO mi estas kontenta.

Tibor Sekelj

VIRINA KONFERENCO KONSIDERAS ESPERANTON

De la 9a ĝis la 13a de septembro okazis en some-ra restadejo en la laŭrentia regiono en Kebekio nepublika konferenco de eminentaj virinoj el 17 landoj por iniciati ĉe la Unuiĝintaj Nacioj "Internacian Jaron de Kunlaborado" kaj por doni konkretajn proponojn por porpacaj projektoj al la sesioj de la 17a Ĝenerala Asembleo realigotaj dum tiu ĉi jaro.

45 personoj el la 62 ĉeestantoj submetis proponojn el kiuj kristaliĝis rezolucioj prezentataj al la Unuiĝintaj Nacioj. Inter ili estis unu, kiu pri-traktas la lingvajn problemojn kaj en ĝia fina formo tekstas jene :

Konsiderante ke interkomprenado kaj komuni-kado inter homoj de diversaj gentaj originoj kon-tribuas al la konservado de mondpaco, ni deklaras peti UNESKO-n, ke ĝi fondu komisionon por studi la urĝan bezonon de la enkonduko de unu inter-nacie uzota lingvo, ĝi estu Esperanto aŭ iu alia, universale instruota kiel dua lingvo kaj uzota por internacia komunikado.

Interese ŝajnas al mi raporti pri la lingvaj mal-facilaĵoj, kiuj okazis dum tiu ĉi konferenco. La angla kaj franca estis la oficialaj lingvoj, sed fak-te nur la delegitino de Pollando kaj kelkaj franc-lingvaj kanadaninoj uzis la francan lingvon. Oni resumis iliajn parolojn angle, kion oni ne faris franclingve post anglaj paroloj. Eĉ inter parolin-tinoj el la angle parolantaj landoj estis grandaj diferencoj de parolmanieroj. Tio estis konstatita kiel kuriozaĵo dum la konferenco, sed por la dele-gitinoj lernintaj la anglan kiel fremdan lingvon, eĉ se ili bonege sciis ĝin, tiu diferenco malfaciligis interkomprenon.

Kvar el la kvin virinoj de la rusa delegacio tre bone parolis la anglan. Nur unu, justicministino, ne parolis ĝin. Nelly Arak, kanada interpretantino, kies denaska lingvo estis la rusa, tradukis por ŝi. Al ĵurnalistino Nelly Arak poste rakontis pri siaj malfacilaĵoj : Kelkfoje ili havis diversajn opiniojn pri la signifo de certaj vortoj. Ekz. ili diskutis dum longa tempo pri la difino de la vorto "internacia" ĝis kiam ili interkompreniĝis, ĉar por tiu vorto la rusa havas tri diversajn. Nelly Arak, kiu mem estas esperantistino, atentigis la ĵurnalistinon, ke tio ne estus okazinta, se oni estus uzinta Esperan-ton.

Ofte homoj asertas, ke la internacia lingvo de ridetoj neniam maltrafas la celon. Al tiuj homoj mi nur deziras ĉeesti similan konferencon. Ni ĉiuj provis tiun rimedon rilate al la japana delegitino. Ŝi lernis la anglan, germanan kaj francan ling-vojn. En ĉiuj tri mi vane klopodadis interkompre-niĝi kun ŝi. Ĉio pri kio mi certas estas, ke ŝi trans-donis salutojn de s-ro Ito al mi. La konferen-caninoj same kiel mi klopodis, ke la japanino ne sentu sin disigita de la aliaj pro la lingvaj baroj,

tamen nia entuziasmo kaj la sento de urĝeco por fari efikajn proponojn por sekurigi la pacon devi-gis nin eluzi la unikan ŝancon de interŝanĝo de ideoj kun tiom da diversnaciaj kaj bone informitaj eminentulinoj. Kun bedaŭro mi ree kaj ree devis konstati, ke la afabla japanino ie sidas sola. Poste alvenis alia japanino, sed ankaŭ ŝi ne estis la atendita lingvospertulino, ŝi fakte eĉ unu vorton ne parolis en alia lingvo. Nur lastmomente alvenis angleparolanta japanino. Fakte tio estis la sola doloriga travivaĵo por mi dum tiu internacia vi-rina packonferenco, kies harmonia atmosfero kaj atingoj superis miajn plej kuraĝajn revojn.

La supremenciitan rezolucion mi iniciatis. Ĝis la lasta momento mi tre dubis, ĉu mi sukcesos ak-ceptigi ĝin eĉ en la fina malfortigita formo. Ĉar krom la kanadaninoj, kiujn mi pere de Voĉo de Virinoj jam "prilaboris", neniue estis ĝuste infor-mita pri nia lingvo escepte de d-rino Hutchinson, usona kvakerino, kiu ĉeestis la ĝenevan konfe-rencon de Anthony Brooke, parolis kun prof. Pri-vat kaj partoprenis tie provlecionon de s-ino Isbrucker.

Oni pridiskutis la prezentatajn rezoluciojn an-taŭe en studrondoj. En la studrondo pri edukaj projektoj, kiu okupiĝis pri mia rezolucio, laŭtiĝis la kutimaj miskoncepcioj: Nesufiĉa esprimkapablo de Esperanto, malfacileco por orientanoj, neekzisto de literaturo kaj de parolantoj, supereco de Inter-lingua ktp. Estis facile por mi kontraŭ-argumenti kaj helpis min la informnumero de Kanada Espe-ranto-Revuo, kiun mi donacis al la partoprenantoj. En tiu mia studrondo la plej diversaj projektoj de kulturaj interŝanĝoj estis proponitaj, preskaŭ ĉiam mi povis mencii, ke ni realigis tiun proponon jam en la kadro de nia esperanto-movado. Tio okazis tiom ofte, ke finfine je novaj proponoj mi nur devis iom levi la UEA-jarlibron, kaj la aliaj ridete elvokis : "Ho, Esperanto jam havas ĝin !"

Estas malnova vero, ke ŝanĝo de emocia sinteno ne venas samtempe kun la pliriĉigo de la intelekta kono. Sed dum la konferenco ja ankaŭ ne mankis tiu emocia sperto de lingvaj baroj en la personoj de la du japaninoj. Mi jam skribis, ke tiu sperto tiel amare tuŝis min, kaj tion iom konstatis certe ankaŭ tiuj inter ni, kiuj ĝis nun emis ignori la ek-ziston de lingvaj baroj.

Mi scias, ke la unue alveninta japana delegitino apartenas al la plej fervoraj pacbatalantinoj. Kiajn valorajn kontribuojn ŝi povus esti doninta, se ŝi estus uzinta parteton de sia energio por antaŭe lerni Esperanton ! Tiam ŝi estus povinta esprimi sin almenaŭ kun mia helpo. Sed pli bone, kom-preneble, estus, se Esperanto estus estinta la ofici-ala konferenca lingvo. Sed por tio necesas, ke pli da eminentulinoj lernu nian lingvon. La akceptita rezolucio espereble montros al kelkaj la vojon.

Vilma Eichholz

Komitatestino por internacia korespondado de "Voĉo de Virinoj (Kanado)"

SPERTOJ PRI LA INTERNACIA DIPLOMO

(Reago al „Pensoj pri la Internacia diplomo” de
Norman R. Smith en revuo „Esperanto” septembro 1962)

La artikolverkinto, kiu estis ankaŭ sekretario de la Internacia Ekzameno en la unua jaro de ĝia ekzisto, tute pravas en sia aserto, ke ”malgranda interesiĝo indikas ian malsukceson en niaj planoj por la ekzameno”. La artikolverkinto pravas ankaŭ en ĉiuj aliaj siaj pensoj, opinioj kaj konstatoj, nur en la tuta bone prilaborita artikolo pri la Internacia Ekzameno, li ne tuŝis la kernan problemon. Ĝi kuŝas en la malgranda vorto ”kial”. Ne sufiĉas nur konstati, sed esplori kaj prianalizi kial iu fenomeno estas ĝuste tia kia ĝi estas.

Eksterdube, ke UEA forminte kaj fondinte la Internacian Ekzamenon ne celis fari ĝin por ke unu persono en daŭro de tri jaroj sukcesu akiri la internacian diplomon. Nenie en la mondo ekzistas universitato aŭ altlernejo, kies postulojn sukcesus kontentigi tiel malgranda nombro de kandidatoj.

Estus absurde nei, ke la ekzameno devas esti ”rigora eĉ severa” kaj ke ni ”devas kompari la postulojn de la internacia diplomo kun la postuloj por diplomo pri nacilingva kompetenteco de samnacio”. Ĝuste en tiu komparado kuŝas la malsukceso de la Internacia Ekzameno — ĉar ĝi prezentas malsukceson, ni havu la kuraĝon konfesi tion.

En ĉiuj universitatoj kaj altlernejoj la studentoj devas pruvi dum la ekzameno rigoran scion. Sed tiuj studentoj, antaŭ ol ili prezentis sin ĉe la ekzameno, aŭskultis prelegojn, partoprenis ekzercojn kaj seminariojn, havis provekzamenojn kaj bone povis kaj akiri kaj elprovi sian scion havante eblecon pritaksi la propran kompetentecon aperi antaŭ la ekzamenantoj. Krom tio studentoj havas je dispono ne nur ĉiujn necesajn librojn, sed ankaŭ helpajn stud-materialon (*scripta*) el ĉiu lernobjekto, ĉar la jarcentlonga praktiko montris neblon por normalaj homoj parkerumi enhavojn de la tutaj libroj. Pro tio ekzistas helpa stud-materialo kiu klarigcele prilaboras demandojn plej oftajn en la ekzamenado. Almenaŭ tiel estas en Jugoslavio, kaj certe ĝiaj altlernejoj ne estas la solaj en la mondo, kie regas tiaj cirkonstancoj. Por ebligi al studentoj akiron de la necesa scio, en Jugoslavio la ŝtato elspezas miliardojn da dinaroj por profesoroj, prelegantoj en seminarioj kaj gvidantoj de ekzercaj laboroj. En ĉiuj universitatoj en la

mondo estas simila situacio. Ĉar oni ne rajtas nur postuli kaj entute ne zorgi ĉu eblas plenumi la postulojn aŭ ne.

Se ni ne volas kompari la Internacian Ekzamenon kun la reĝimo reganta en la universitatoj, ni komparu ĝin kun diversaj aliaj altgradaj kaj postulemaj ekzamenoj ekzemple: ekzamenoj en postdiplomaj studoj, ŝtataj ekzamenoj por oficistoj, ekzamenoj de kuracistoj por akiro de specialistiĝo kaj multaj similaj. La postuloj kaj la reĝimo estas malsame regantaj en tiuj tre diversaj ekzamenoj, sed por ĉiu el ili ekzistas la necesaj libroj kaj studmaterialo (*scripta*) kaj por multaj estas ankaŭ organizitaj specialaj kursoj kaj seminarioj, kiuj ekzamenpreparas la kandidatojn. Krome, ĉe ĉiuj altgradaj ekzamenoj en la universitatoj aŭ ekster ili, ekzistas postuloj ne nur rilate la ekzamenantojn sed ankaŭ rilate la ekzamenantojn. Tiuj lastaj ne rajtas demandi ion, kion la studento ne aŭdis en prelegoj aŭ ne povis trovi en libroj aŭ studmaterialo. Se tamen okazas io simila, tuj la studenta organizaĵo intervenas — almenaŭ en Jugoslavio, kaj mi dubas ke alilandaj studentoj estas malpli atentemaj rilate la defendon de siaj rajtoj.

UEA ĝis nun oferis nenion por ebligi al la kandidatoj por la internacia diplomo akiron de la necesa scio. La sekretiino de la Internacia Ekzameno publikigis nur la liston de la bezonata literaturo. Kelkaj el la menciitaj libroj estas aperontaj kaj kelkaj neaĉeteblaj. Vere bonega helpo!

Kiel la kandidatoj por la Internacia Ekzameno povas respondi al demandoj pri negravaj eventoj el la historio de la movado (nomoj de funkciuloj en diversaj internaciaj organizaĵoj, mortintaj antaŭ 50 jaroj)? Libroj, kiuj informas pri tiaj detaloj ne ekzistas. Ne nur tio. Ekzistas neniuj libroj informanta pri la historio de la movado en lastaj jaroj.

Kiel la kandidatoj respondos al demandoj pri esperanta literaturo, ekzemple pri unuopaj artikoloj aperintaj sur la paĝoj de la ”Literatura Mondo” antaŭ 30 jaroj? La verko de Drago Kralj ”Kvar prelegoj pri esperanta literaturo” ne informas pri tio, kaj ĝi estas la postulata literaturo por la Ekzameno.

Tiaj demandoj estis dum la unua ekzamenado en Bruselo. Tiaj kaj multaj similaj.

La estraro de UEA komprenis ke io nebonas en la Internacia Ekzameno. Tion pruvas ĝiaj proponoj pri organizo de koresponda kurso aŭ seminario por kandidatoj. Se la koresponda kurso ne estas sufiĉe digna por la "intenco kaj naturo de la Diploma", seminario estas la minimumo, kion UEA povus kaj devus organizi por kandidatoj.

Efektivigo de tiu propono ne estas tre malfacila. Kontraŭe, kun iom da bona volo kaj monofero ĝi estus realigebla jam venontan jaron. La Kongreso en 1963 estos en Sofio. Jugoslavio estas la najbara lando kaj en ĝi troviĝas la esperantista kampadejo Primošten, kie la restadkosto (laŭ la ĉijara tarifo) estas por unu persono por 10-taga restado malpli ol 10 pundoj. Ĉu ni ne povus okazigi seminarion en Primošten kaj dum 8 tagoj prelegi al kandidatoj 4 horojn tage pri la gramatiko, literaturo, historio kaj organizo de la movado? Dum 32 horoj certe la kandidatoj kompletigus la necesan scion pri la objektoj por kiuj aŭ la libroj mankas aŭ la problemoj estas trakteblaj tiel kaj aliel. Prelegantoj, kompreneble, devus esti nur ekzamenantoj en la Internacia Ekzameno. Sed ĉu estus malagrabla al la eminentaj prelegantoj instrui sub la pinarba branĉaro, ĉirkaŭitaj de la brilanta lazuro de la ĉielo kaj maro, kaj post la preleghoroj ĝui ĉiujn belaĵojn ofertitajn de la sunplena apudmara strando?

Se venus 2 prelegantoj-ekzamenantoj, la elspezo por ilia restado (sen vojaĝkostoj) sumus malpli ol 20 pundojn.

Tiajn seminari-lokojn ni havas en Eŭropo kelkajn, verŝajne ankaŭ ekster ĝi. En Francujo Gréssillon, en Danlando ĉiuj lokoj, kie estas organizitaj feriaj kursoj, ankaŭ ĉeĥoslovakaj tendumejoj — nur pri la kostoj en tiuj lokoj mi scias nenion, sed preskaŭ certe ili estus malpli altaj ol

— kostis nin ĝis nun la prezentaĵoj de la Internacia Arta Teatro. Ili estas tre, tre gravaj — sed ankaŭ la Internacia Ekzameno por altigo de la lingvonivelo gravas;

— kostis nin ĝis nun agado en Azio kaj Afriko. Ĝi estas pli ol grava — sed ankaŭ akiro de la internacia diploma gravas.

La artikolverkinto sinjoro Norman R. Smith "volas pledi por plimultaj kandidatoj de la ĝusta speco". Sinjoro Smith, se ĉio restos en la Internacia Ekzameno tia kia estas nun, via enhavoplena kaj belvorta pledado estos vana! Kandidatoj ne plimultiĝos, nek de la "ĝusta speco", nek de la speco ekster la "ĝusta".

La mekanismo de la Internacia Ekzameno grinças en sia medolo, oni devus aŭ ĉirkaŭ la sama medolo konstrui alian mekanismon aŭ forigi la grincadon. Por ambaŭ riparoj estas bezonata fortostreĉo, sed antaŭ ĉio alia bona volo kaj sincera kaj objektiva prijuĝo de la nuna situacio.

Emilija Lapenna

GRAVA ELDONAĴO DE „PHILIPS”

La grava kaj mondfama firmao Philips en Eindhoven, Nederlando, ĵus eldonis grandformatan, dudekpaĝan ilustritan katalogon pri siaj x-radiaj kaj elektromedicinaj aparatoj en Esperanto. Per ĝi la firmao esperas atingi la medicinan profesion de la tuta mondo.

Tiu ĉi iniciato de Philips montras ankoraŭfoje la kreskantan rekonon pri la utileco kaj grava rolo de la Internacia Lingvo en modernaj komercaj rilatoj. Atentigu vialandajn medicinistojn pri tiu ĉi katalogo!

EDUKADA EKSPERIMENTO EN ANGLUJO

Jen la tria jaro en kiu okazis eksperimento pri Intensaj Kursoj en Barlaston, apud Stoke-on-Trent, en Anglujo. La kursoj, unu por komencantoj, la alia por progresintoj, okazis 2-8 septembro, 1962, en la Kolegio "Wedgwood Memorial", kiu konstruaĵo apartenas al la loka edukada aŭtoritato. Dum la jaro oni utiligas la kolezion por diversspecaj edukadaj kursoj. Do la eksperimento estas oficiala, kun la subteno de la loka progresema aŭtoritato.

En la unua kurso troviĝis 10 komencantoj, en la dua por progresintoj 11, entute 21, el kiuj la duono estas profesiaj instruistoj. Dum la tago la studperiodoj nombris tri, ĉiu kun daŭro de unu horo kaj duono, do por la kvin labortagoj, entute dudek du horoj kaj duono da rapida studado. Vespere okazis kulturaj kaj distraj eroj, inkluzive de prelegoj kun lumbildoj, filmprezentaĵoj kaj koncertoj. Ĉiuj studentoj loĝis kaj manĝis en la kolegio, kie regis atmosfero amika, gaja, tamen serioza. La tuta kosto al ĉiu studento estis tre modera, kaj ekzistis ebleco ricevi eĉ subvencion de la propra edukada aŭtoritato.

Tiaj kursoj prezentas metodon por rapide prepari kompetentajn instruistojn por la baldaŭa (ni esperas!) vasta disvastigo de Esperanto en la lernejoj.

Tiel sukcesplena estas la ĝisnuna eksperimento ke oni decidis pligrandigi ĝin en la jaro 1963. La gvidantoj de la eksperimento jam luis la tutan kolezion por la kursoj de la venonta jaro, kiuj ampleksos tri gradojn, (a) por komencantoj (b) por progresintoj, kaj (c) speciala kurso, tute en Esperanto, por studi la kulturan flankon de nia Movado. Je la fino de la venontjaraj kursoj oni intencas starigi ekzamenojn por (a) Elementa Atesto de B.E.A. (b) Diploma de B.E.A. kaj (c) La plej alta Diploma en Britujo, L.B.E.A. Jam pluraj aliĝis al la novaj kursoj, konsilinda paŝo, ĉar spaco en la kolegio estas limigita. La direktorino de tiuj novaj kursoj estos Marjorie Boulton, la bonekonata verkistino. Por pluaj detaloj, bonvolu vin turni al S-ro J. Baggaley, "Cortina", Common Lane, Rough Close, Stoke-on-Trent, England.



La Kolegio "Wedgwood Memorial".

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵoj ni recenzas; unuope ricevitaĵoj ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

**L. L. Zamenhof: PROVERBARO ES-
PERANTA.*** Alfabeto ordigita kaj pro-
vizita per indeksoj analiza kaj sin-
teza de C. Rogister. Kun enkonduko
de G. Waringhien kaj antaŭparoloj
de M. F. kaj L. L. Zamenhof. Eldono
de Stafeto en la serio Beletraj kaje-
roj, n-ro 10. 168 p., prezo: 1,50 us. dol.
(21 steloj).

Kiam Marko Zamenhof verkis sian frazeologion de proverboj, sentencoj kaj parolturnoj el la lingvoj rusa, pola, franca, germana, lia filo Ludoviko proponis aldoni Esperantan kolonon al la verko. La patro plezure konsentis, sed lia baldaŭa morto haltigis la eliradon de la kajejoj. Zamenhof tamen finpretigis la Esperantan parton kaj eldonis ĝin aparte. Dum longe tiu grava Zamenhova verko estis nehavebla kaj ĝia nuna reapero estas ĝojiga evento por la sana evoluo de nia lingvo.

La trosimpla titolo *Proverbaro Esperanta* ne aludas la elementon de vivaj parolturnoj: *Lasi fali la manojn. Inter kvar okuloj. Iri lace-pace. Vivi larĝe kaj lukse. Kun la peko en mano. Malsaĝa kiel ŝtupo. Mizero sur mizero. Li foriris kun longa nazo. Tio estas lia amata ĉevaleto*, ktp. apud la efektivaj proverboj kaj sentencoj: *Eĉ blinda kokino povas trovi grajnon. Kiu sin enjungis, devas tiri. Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon. Ne bela estas amata, sed amata estas bela*. Per tiu kolekto Zamenhof liveris al la esperantistaro pretan bazon de popola saĝo, vortbildoj kaj ŝablonaj esprimoj, por doni koloron al la lingvo kaj senpensan facilecon en la konversacio kaj verkado.

Unuavide ŝajnas, ke la esperantistoj tre malmulte profitis tiun riĉon. Kribrinte la 2630 erojn de la kolekto, mi trovis kun certeco nur ian kvindekon, kiu vere iom cirkulis en la parolaj kaj skribaj interrilatoj: el ili proksimume la duono penetris en nian poezian kaj prozan literaturon. Ekzistas ja unuopaj samideanoj, por kiuj la Proverbaro estas muŝo en la kapo, kaj kiuj dense priŝutas siajn leterojn kaj parolon per ties esprimoj, sed tiujn mi ne kalkulas. Entute la esperantistoj neglektis la proverbaron, ĉar ili simple ne konis ĝin. La nuna reel-dono helpas forigi tiun mizeron.

La proverboj fontas pliparte el kampara medio, kun ties zorgoj, mastru-

mado kaj sociaj rilatoj, kaj tio klarigas la plipezon de averto super admono, de praktika konsilo super filozofio. Multaj proverboj temas pri fruleviĝo, laboremo, ŝparemo, ŝuldoj, grandsinjoroj. Vivogravaj estas la limŝtonoj: *Malpaco pro limo fariĝas kutimo, malpaco pro kredo fariĝas heredo*. Kaj tre kamparana estas la konstato: *Leĝo malaperas, moro daŭras*.

Mi sekve ne scias, kiagrade la pli kleraj aludoj sin dankas al la originalo aŭ al la traduka spriteco de Zamenhof: *Trafi de Scilo al Ĥaribdo. Kresko mamuta sed saĝo liliputa. Ne en unu tago elkreskis Kartago. Kontraŭ tuta kohorto eĉ Herkulo estas senforta. Konservas eĉ karbo strukturon de l'arbo*.

Oni komparu tiun lertecon kun la pedante sed peze tradukitaj proverboj de Bennemann en *Tra la mondo!* En sia esaro *Lingvo kaj vivo* Waringhien deklaras la Proverbaron la plej granda poezia kreo de Zamenhof post la lingvo mem. Por mi tio estas senduba. Ĝi estas ĉefverko poezia kaj ankaŭ poetika.

Zamenhof majstre hejmgigis en nia lingvo la popoldirojn per rimedoj de ritmo, rimo kaj metaforo. Certe la fakto, ke li havis sub okulo la kvarlingvajn ekvivalentojn kun ties varioj, donis al li apartan liberon por trafa tradukado. Kaj la celo imiti vivan parolon kondukis lin anticipi licencojn de postaj aŭtoroj:

1. Rimoidoj kaj asonancoj. *Deko da pekoj, unu la puno. Al bona ĉasisto iras mem la besto. Li sidas en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj. Sen fajro ne brulas eĉ pajlo. Tro akra fajro estas sen daŭro*.

2. Elizio. *Kastel' en aero, malsato sur tero. Azen' al azeno riproĉas malsaĝon*. (La poetoj kutime elizias ĉe unu el du samaj substantivoj). Kuraĝa iniciato estas la elizio pure proza: *Ĝi helpas kiel hirud' al mortinto. Temp' estas mono*. Ĉu iu ĝin sekvis krom Miĥalski en *Prologo?* "Kaj, ĉar la kor' de poeto estas de l' vivo spegulo" ktp.

3. Elipsoj. // *Petro rifuzas, // Paŭlo ekuzas*. (Kion - tion) // *Formanĝis en merkredo, // ne serĉu en vendredo*. (Kion oni - tion oni) *Kio // mia, tio // bona*. (estas) *Okulo avidas ĉion kion // vidas*. (ĝi) *Hundo bojas, // homo vojas*.

(sed) *Okulo de mastro // pli ol beno de pastro*. (faras) *Amo // pli kora, disiĝo // pli dolora*. (Ju - des) *Pri la lupo rakonto, kaj la lupo // renkonte*. (venas) // *Okulo ne atentis, dorso eksentis*. (se)

4. Sintaksa libero. *Ju homo pli fieras, des puno pli severa*.

5. Nuancigo de senco. *Sako = monujo. Fremda = aliula*. Kiu bone ŝmiras, bone veturas. (donas subaĉetojn) *La afero ne brulas*. (urĝas) *Puno pekon ŝvingas*, favor-koreco ĝin estingas. (akcelas) Ankaŭ: *pele = 1. ĉasi. 2, rapidi. Beki = pepi; sekreti = konfideci*. (Tiu du vortoj povas ankaŭ signifi *bekpiki, teni sekreton*, simile kiel *prunti* povas, laŭ la kunteksto, signifi preni aŭ doni prunte.) *Mueli = 1. paroli konfuze; 2. maĉi*. *Ne kotas besto en sia nesto*. (fekas) *Akra fajro (intensa)*. *Akvo kura (fluanta)*.

Tiuj kvin rimedoj ilustras kiel ritmo, koncizo kaj vortviglo estas komunaj bezonoj de la konversacio kaj la poezio.

La enkonduko de Prof. Waringhien estas mem perfekta recenzo, laŭ siaj vortŝparo, larĝo kaj klerco; mi tamen lasu ĝin por frandaĵo kaj rekompenco al la aĉetonto! Nur unu lian kritikon mi volas tuŝi. Li opinias, ke en du lokoj la rimserĉo delogis Zamenhof uzi *akurate* kaj *benefico* missence: *Ni amu nin frate, sed kalkulu akurate. Ne ekzistas ofico sen benefico*.

Nu, mi prefere trovas, ke tia uzo nuancigas la du vortojn laŭ la celitaj sencoj, ĉar literatura uzo animas vortojn pli (pardonu min, s-ro vortaristo!) ol inertaj difinoj en vortaroj.

La Zamenhova eldono estis aranĝita laŭ alfabeto ordo de la ruslingvaj temoj, la nuna estas vicigita laŭ alfabeto ordo de la Esperantaj frazoj. Tiel oni povas tuj trovi konatan proverbon, dum la indeksoj listigas la temojn. Tio estas granda avantaĝo kun du etaj malprofitoj. Unu estas, ke mankas la belaj blokoj da samtemaj proverboj — ekzemple pri virino, mensogo, amiko — kiujn havas la unua eldono. La dua estas, ke en la unua eldono diversaj esprimoj en si mem ne klaraj estis diveneblaj per la samtema ĉirkaŭteksto, sed nun, izolate, ili restas enigmaj. Ekzemple: *Pli bone estas ŝviti, ol tremi*. Ĉu: pli bone tro varmi, ol frosti? Aŭ pli bone laboregi (sed resti libera) ol timi en servuto? El la ĉirkaŭteksto de la unua eldono, temas pri la dua signifo. Apud *Hakado de ligno donas lignerojn* sidis la lumjeta *Kie estas pano, ne mankas panpecetoj*. *Fiŝo volas naĝi* ŝajnas simpla konstato, sed la apuda proverbbo *Fiŝo sen vino estas veneno* klarigas la efektivan signifon. Ideala do estus aranĝo alfabeto laŭ la temoj.

Ĉiu trovos en ĉi tiu neelĉerpebla trezorujo siajn juvelojn. Inter miaj ŝatoj estas jenaj. *Azenon komunan oni batas plej multe*. *Kapoj diferencas, kranioj egalas*. *Danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe kaj malsa-*

ĝulo de ĉiuj flankoj. Malnova afero en nova livero. Farita via faro, nun adiaŭ, mia kara! Sonorilo vokas al preĝejo, sed mem neniam eniras. Danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas - danĝero ĉesas, ni Dion forgesas.

Troviĝas eĉ frazoj el nia Esperanta kulturo. Post *De guto post guto disfalas granito* kaj *Guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras*, la modesteco de Zamenhof fine permesis al li skribi *Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan*. Oni trovas *Maro da mizeroj* (el Hamleto) kaj *Ĝi estas por mi volapukaĵo*. Oni povus deziri plimultigon de tiu hejma elemento: Ni fosu nian sulkon! Forte, kuraĝe kaj elegante. Jen zorgoj mankis, nun ricevu! (Li estas) la raŭpo en la Esperanta fromaĝo. Silenti kiel fiŝo. Fermu la faŭkon — la bekon. Ne riproĉu spegulon, se ĝi montras nigrulon. Nun festo, morgaŭ pesto. La vivo ne estas marcipano. Frat' fraton atakas ŝakale.

La redaktado estas tre skrupula. Mi trovis nur du erarojn. 930 *Kion fari?* devas esti *Kion fari!*, kaj 1761 kaj 1762 estas la sama proverbo. Sed ĉu ne la jenaj formoj, reproduktitaj el la Zamenhofa eldono, portas eraron? 692 *Ĝi estu por vi al sano!* (por via sano) 201 *Brogita eĉ sur akvon blovas* (malvarman akvon).

Rekomendi ĉi tiun verkon estas superflue. Mia sola rekomendo estas: tuja reeldono post elĉerpo!

Cetere, ĉu neniuj emas kompili libron de Esperantaj citaĵoj?

R. Rossetti

Miyamoto Masao: FACILAJ LEGAJOJ. Eld. DAIGAKUSYORIN,* Tokio, 1962. 116 p. 17,2 × 10,4 cm. Prezo: 0,60 US. dol. 9 steloj.

Estus tre oportune, se ĉiuj esperantaj libroj estus aĉeteblaj ĉe iu ajn librobuto; tio tamen ne okazas en Japanujo. Sed kelkaj priesperantaj lernolibroj estas vendataj en iom grandaj vendejoj en la lando; ilin eldonas du librejoj en Tokio, ambaŭ konataj kiel eldonejoj de lingvaj libroj, unu el kiuj estas DAIGAKUSORIN, kaj tiu ĉi eldonis lastatempe: "Facilaj Legaĵoj". La eldonejo havas 'kvarsemajnan serion' pri diversaj lingvoj, ekzemple: "Esperanto en kvar semajnoj", sed ĝis nun ĝi ne donis al la lernantoj kiuj per tiu komencis nian lingvon, ian legolibron, kvankam de ĝi aperis jam vortareto, interparola ekzercolibro, inicilo al Esp.; kaj nun, oni havas fine la libreton kun tri rakontoj krom deknaŭ anekdotoj: LA NEĜULINO; LA JUNULINO, LA CAPELO KAJ MI (orig. de J. H. Rosbach); UNU PAĜETO EN MIA LERNEJA VIVO. Ĉiuj tekstoj en du lingvoj: esperante kaj japane.

La titolo mallogus ne malmulte da personoj, al kiuj la "Facilaj legaĵoj" ŝajnus nur io bagatela, ne plu bezonata;

ĉu la anekdotoj ne estus tamen tro malfacilaj, kvankam ili okupas la unuan parton de la libro, por apenaŭ progresintaj lernantoj? Almenaŭ japanaj komencantoj ĝenerale havas evidentan malfacilon por sufiĉe ilin ĝui; necesus ja klarigi, kial ili estas ridindaj... Sed, oni havas ankaŭ la japanan tradukon por ĉiu teksto, kaj krome piednotoj pri vortoj kaj esprimoj helpas komprenon; estas tamen dezirinde doni pli da piednotoj en tia libro, ĉar la donitaj ŝajnas iom tro malmultaj. En la fino de la libro staras, en kelkaj paĝoj, ekzercoj koncerne la tri rakontojn, kun respondoj.

La "Neĝulino" kaj "Unu paĝeto...", kiuj estas traduko de KABE kaj originalo de Eroŝenko respektive, estas retuŝitaj en kelkaj detaloj, fare de la kompilinto-komentinto. La rakonto de la blinda poeto Eroŝenko estas aparte impresa. Ŝajnas, cetere, ke oni en Eŭropo ne bone konas la verkojn de Eroŝenko.

Tacuo Huĝimoto

NIA FORUMO

KONGRESA ĜENTILECO

Kial la esperantistoj ne scias konduti? Dum la pasinta Universala Kongreso tiu ĉi demando denove prezentis sin al mi.

Kvankam en la Kongresa Libro estis skribite, ke "por la prelegoj de la Internacia Somera Universitato la deĵorantoj ŝlosos la pordojn tuj kiam komenciĝos la prelego", tio ne okazis. Pro tio kelkaj (fakte pli ol kelkaj) kongresanoj ŝajne sentis sin rajtigataj en- kaj eliri laŭplaĉe. Belan ekzemplon pri tio donas la prelego de s-ro Sadler pri aŭtomata tradukado, legita de mag. Wells. Eĉ dum la lasta frazo ankoraŭ eniris kelkaj "interesiĝantoj", post jam multaj pli "fruaj" interrompoj.

Ĉu fakte estas neeble, ke la deĵorantoj efektive ŝlosu la pordojn ĉe komenciĝo de lekcio, aŭ ĉu la nura ebleco por igi la ISU iome pli universitateca estas la postulo, ke ĉiuj ĉeestontoj montru rajtigilon pri ĉeesto de lekcioj en vera universitato? Eble veraĵ studentoj scias, ke ne estas dece, ĝeni profesoron aŭ lektoron dum lia prelego — ankaŭ ne per vokado: "pli laŭte!"

Wouter F. Pilger

SED ĜI ESTAS BONEGA!

Oni kutimas ne respondi al recenzoj, kaj ankaŭ mi ne intencas tion fari. Pro tio mi flanken lasas la temon pri "la nivelo de nia Esperanta kritiko" direktitan al mi en la recenzo de Victor Sadler pri BELARTO 2 (ESPERANTO; julio-aŭgusto 1962), por

defendi la verkon de Elisabeth Dored *Mi amis Tiberion*, pri kiu mi uzis en mia artikolo en BELARTO 2 la esprimon "bonega romano, treege interesa". Tio, laŭ s-ro Sadler, estas "banalaĵo en kritiko pri malgranda, neforta literaturo". Mi ŝatus substreki, ke tiu esprimo, koncerne la romanon de Elisabeth Dored tute ne estas banalaĵo, ĉar la romano vere estas bonega kaj ĝi estas treege interesa. Tio estas la unuanima verdikto de la norvega kritikistaro, kaj de tiuj, kiuj legis la libron, kaj ne nur de mi. Ankaŭ mi konas la libron. Ĉu s-ro Sadler konas ĝin, parolante pri "malgranda, neforta literaturo"? Kia ajn estas la Esperanta kritiko — ĝi ne ĉiam estas forta, tion mi volonte konfesas — oni devas neniam juĝi verkon, kiun oni ne konas.

Johan Hammond Rosbach

TURISMAJ ABONANTOJ

Multaj turismaj oficejoj eldonas esperantlingvajn prospektojn, kiujn oni povas mendi, ĉu individue, ĉu grupe.

Por malpliigi la koncernajn elspezon de siaj membroj, la klubo de LILLE (Francujo) kreis apartan turisman abonon. La interesuloj pagas unu aŭ du eksterlandajn leterafrankojn ĉiujare kaj ricevas regule, pere de la sekretario, la plej belajn ilustritajn faldfoliojn eldonitajn en esperanto.

Tiamaniere, la libervolaj abonantoj kontribuas elĉerpigi la diversajn dokumentojn kaj ebligas eventualan duan aŭ trian eldonon. Krome, la kolektita materialo, ĉiam pli aktuala, permesas prepari estontajn ekspoziciojn kaj personan konstantan varbadon.

L. Giloteaux

GRANDANIMA KAJ ĈARMEGA GESTO

Nia simpatia, vigla, junkora, entreprenema kaj kara membrino Sinjorino A. C. H. v. d. Beek-Kelly el Amsterdam, regule vidata en kongresoj kaj aliaj esperantistaj okazaĵoj, sendis al ni antaŭ kelkaj tagoj la jenan leteron:

"Honore al mia okdeka naskiĝtago mi ĝiris 1000 guldenojn por plidisvas-tigi Esperanton."

En la nomo de la tuta Asocio ni ĉi tie plej kore gratulas al S-ino v. d. Beek pro ŝia jubileo kaj varme dankas al ŝi pro ŝia belega penso kaj malavara ago.

La jam ricevita sumo eniris la konton "Por vastigo de la agado". La gesto de S-ino v. d. Beek estu inspira al aliaj. Ĉu eble ni iam havos en la oficeja domo ĉambron "Okdekjaruloj"? Sed ankaŭ pli junaj membroj estu inspiritaj!

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

RADIO – KAJ T.V. – BABILOJ

La geesperantistoj havas la dissendojn
kiujn ili meritas.”

(30)

Prof. d-ro Edmond Privat †

Grava perdo por la tuta Esperanto-movado estas la tre bedaŭrinda morto de nia respektinda samideano prof. d-ro Edmond Privat, sed speciale por la Esperanto-radio-aŭskultantaro.

Liaj merkredaj radio-prelegetoj pri "Esperanto-ideologio" antaŭ la radio-mikrofono de la Svisa Radio, kiu ripetis ilin sabatvespere, estis tre aŭskultindaj laŭ enhavo kaj formo kaj logis multegajn gesamideanojn unufoje semajne, kelkajn eĉ dufoje al la radioricevilo.

La enhavo estis nobla, interesa kaj instrua kaj la bela elparolo, flua kaj eleganta stilo estis imitinda ekzemplo por la fidelaj geaŭskultantoj, kiuj jam en pasinta junio rimarkis, ke la tre ŝatata prelegisto devis ĉesigi siajn radioparoladetojn pro malbona sanstato.

D-ro Arthur Baur, lia same ŝatata radio-kolego de la Svisa Kurtonda Stacio, devis je sia kaj ankaŭ je nia bedaŭro sciigi al ni, ke prof. d-ro Edmond Privat mortis la 28-an de aŭgusto 1962-a. Laŭ "Enciklopedio de Esperanto" (paĝo 452-a) li naskiĝas 17-8-1889-a. Li do iĝis 73-jara. Sur la indikita kaj sekvanta paĝoj oni povas legi interesajn detalojn pri lia meritplena vivo, sed ne estas menciita tie lia grava kunlaboro en la Esperanto-disaŭdigo de la Svisa Radio, kiu preskaŭ ĝis lia morto aŭdigadis regule lian varman, agrablan voĉon, kiu nun por ĉiam silentas.

Feliĉe postefikos liaj presitaj verkoj tre valoraj. Tial estus eldonindaj ankaŭ liaj radioprelegetoj "Esperanto-ideologio" en kolekto. Tian libron certe volontege posedus multaj el liaj fidelaj geradioaŭskultantoj, kiuj konservus tiun kolekton en dankoplena memoro.

Feliĉe prof. Privat havas kiel radioprelegisto indan sekvinton en la nova dua preleganto de la Svisa Radio: profesoro Charles Ecabert el Neuchâtel. Li havas same agrablan voĉon, belan elparolon kaj imitindan stilon kiel prof. Privat kaj parolas pri edukado, por multaj ja interesa kaj valora temo.

Ni deziras al li same grandajn aŭskultantaron kaj sukceson.

La Pola Radio disaŭdigis dufoje la "Roboto-marŝon".

La 9-an de majo 1962-a la Pola Radio en sia merkreda programo "Koncerto kun bondeziroj" disaŭdigis la "Roboto-marŝon" de Sibe Sipke de Jong el Frislando (Nederlando), kantatan laŭ la Esperanto-teksto de la komponinto de la frisa koncertkantisto nia samideano s-ro Arjen Zondervan, Leeuwarden, ĉe piano-akompano de lia samurbano s-ro Piet de Vries.

En Leeuwarden la loka Esperanto-klubo "Frisa Esperantista Rondo" sonregistris tiun dissendon.

La 29-an de aŭg, 1962-a Varsovio laŭ peto ripetis tiun disaŭdigon en simila merkreda programo, do verŝajne surbendigis ĝin.

Kiu eble ne aŭdis tiujn du dissendojn kaj tamen ŝatus foje aŭskulti tiun surbendigitan marŝon prezentatan de nederlandaj artistoj, povus peti de la komplezema stacio Varsovio iaman redissendadon. Sukceson kaj plezuron! Montru vian intereson!

"Cirklo de la Mondo" mortis pro manko de eksterlanda kunlaboro!

La stacio Hilversumo A.V.R.O. estis antaŭe indiferenta pri Esperanto, neniam dissendis Esperanto-programon kaj ne volis aperigi en sia programrevuo informojn pri Esperanto-radio-dissendoj de aliaj stacioj. Fine tia indiferenteco feliĉe finiĝis: ĝia organo regule mencias la Esperanto-radio-dissendojn de la eŭropaj stacioj kaj mem komencis disaŭdigi Esperanto-programeton en la porjunulara programo "Tovercirkel" (= "Magia Cirklo").

Unu el la gegvidantoj, s-ro Herman Broekhuizen, kon-

statinte dum vizito de esperantistaj geknaboj el Finnlando al la stacio, kiel facile ili Esperante babilis kun Hilversumaj esperantistaj geknaboj, eklernis Esperanton kaj jam aplikis ĝin en la supre nomita porjunulara programo.

31-1-1961 li jam paroligis kaj kantigis Esperanton: f-ineto Feliĉa Koopmans el Didam deziris: "Bonan tagon al la infanoj de la tuta mondo!" kaj infana ĥoro kantis Esperante.

S-ro B. mem diris nederlandlingve ion pri la estiĝo kaj apliko de Esperanto kaj pri la intenco formi "cirklon de la mondo" inter la infanoj, kiuj interŝanĝos donacetojn kaj sonbendojn kun samaĝul(in)oj alilandaj. La dissendo de 28-2-1961 estis dediĉita al polaj infanoj kaj tiu de 28-3-1961 al japanaj. Poste sekvis ankoraŭ sonbendo el Anglujo kun Esperanto kaj infankantado... sen Esperanto el Izraelo, Finnlando kaj Hindujo pro manko de kunlaboro de eksterlandaj Esperanto-grupoj.

Tiu ĉeso estas tre bedaŭrinda kaj malpropaganda. Tial estas tre rekomendinde, ke alilandaj Esperanto-grupoj, kiuj povus surbendigi programeton eĉ nur kvaronhoran prezentatan de geknaboj (kantoj, rakontoj, ludoj, enigmoj), serĉu kontakton kun s-ro H. Broekhuizen, kunlaboranto en porjunularaj programoj de Radio Hilversum (A.V.R.O.), postbus 2, HILVERSUM (Nederlando). Helpu revivigi la "cirklon de la mondo", plezurigan kaj propagandefikan kontakton inter diverslandaj infanoj tra la tuta mondo.

Bonvolu relegi la devizon super ĉi tiu kontribuo.

S. S. de JONG Dzn.,
estro Radio-Servo NCKE

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1962

Stato je la 30-a de septembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	3610	4040	111,91
2.	Francujo	6754	7160	106,01
3.	Nederlando	4942	5028	101,74
4.	Germanujo	7085	7146	100,86
5.	Danlando	2876	2896	100,70
6.	Norvegujo	1677	1650	98,39
7.	Svislando	2103	2045	97,24
8.	Japanujo	3265	3170	97,09
9.	Hispanujo	2557	2440	95,42
10.	Italujo	4253	4025	94,64
11.	Finnlando	2525	2385	94,46
12.	Britujo	6661	6283	94,33
13.	Svedujo	6190	5375	86,83
14.	Brazilo	4142	3490	84,26
15.	Belgujo	2006	1630	81,26
16.	Jugoslavio	5560	1670	30,04

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	505	895	177,23
2.	Aŭstralio	1148	1223	106,53
3.	Israelo	285	300	105,26
4.	Aŭstrujo	1440	1450	100,69
5.	Kanado	746	749	100,40
6.	Portugalujo	515	495	96,12
7.	Nov-Zelando	1184	1077	90,96
8.	Islando	250	215	86,—
9.	Madagaskaro	250	211	84,40
10.	Sudafriko	250	195	78,—
11.	Urugvajo	250	155	62,—

Ŝaka Rubriko

(Gvidas : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Kunveno de esp. ŝakistoj en Kopenhago

De jaro 1957 kunvenas ankaŭ ŝakistoj en kadro de la Universala Kongreso de Esperanto. Ili do kunvenis ankaŭ en kadro de la 47a en Kopenhago kaj ni povas diri, ke la kunveno estis tre sukcesa. Ĝi okazis la 8an de aŭgusto kaj prezidis ĝin la prezidanto de Esperanto Ŝak-Ligo Internacia s-ano Torsten Lindberg kaj partoprenis gesamideanoj el 7 landoj (Danlando, Francujo, Germana federacia respubliko, Islando, Nederlando, Pollando kaj Svedujo). Post enkondukaj vortoj la prezidanto legis raporton de sekretario D-ro V. Faigl, laŭ kiu evidentiĝas, ke EŜLI registris jam pli ol 600 adresojn de esp. ŝakistoj el 41 landoj. La evoluo de la ligo progresas, la rilato al internaciaj ŝakaj organizaĵoj (FIDE kaj ICCF) restas bona. En oficiala revuo de Internacia ŝaka federacio FIDE aperis en dua numero de jarkolekto 1962 artikoleto, titolita ŜAKO KAJ ESPERANTO, kiu sur preskaŭ unu kaj duono da paĝoj priskribas la historion de la Esperanta movado kaj mallongan historion de esp. ŝaka organizaĵo. La artikoleto, publikita en germana lingvo, vekis atenton inter abonantoj de la revuo kaj la aŭtoro jam ricevis kelkajn leterojn el diversaj landoj. Ni esperu, ke iam aperados en la revuo ne nur artikoletoj pri Esperanto, sed ankaŭ en Esperanto. La revuo FIDE estas la plej grava ŝaka revuo kaj estas vere tre altnivela. Ĝi havas nur unu mankon : Ĝi aperas en 5 lingvoj, kiuj alternas en ĉiu numero (angla, franca, germana, hispana kaj rusa). Certe nur malmultaj abonantoj povas do legi ĉiujn artikoletojn. Kaj la solvo de tiu ĉi problemo certe ne estas tro malfacila, ĉu ?

Laŭ raporto de s-ano Jean Duthilleul funkcias jam 20 grupoj de korespondturniroj de EŜLI. En ĉiu grupo ludas 7 ŝakistoj. Krome EŜLI organizis kelkajn matĉojn inter eŭropaj ŝakistoj kaj tiuj el aliaj kontinentoj. Ankaŭ la financa raporto estas kontentiga, en la kaso de EŜLI restas 91.94 frankoj.

Ĉiuj raportoj estis aprobitaj.

Ĉar la laborperiodo de la ĝisnuna estraro finiĝis, oni laŭstatute elektis novan estraron, en kiun estis reelektitaj ĉiuj ĝisnunaj estraranoj. Estas do ree jena estraro : prezidanto Torsten Lindberg, Prässebo, Svedujo vicprezidanto kaj sekretario D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio kasisto kaj turnirgvidanto Jean Duthilleul, Briançon, Francujo, estrarano Helmut Rössler, Edenkoben, Germana federacia resp. Poste la kunveno pritraktis kaj aprobis la Laborplanon de EŜLI, ellaboritan konforme al Dua Baza Laborplano de UEA. Laŭ tiu laborplano EŜLI volas plej baldaŭ atingi 1.000 anojn. Ĝi celas plifirmigi kaj plibonigi la bultenon ESPERANTA ŜAKO kaj eldoni la longe deziratan Ŝakan terminaron. La plano antaŭvidas ankaŭ plikreskigon de la nombro de Fak-delegitoj por ŝakludo en la jarlibro de UEA.

La prezidanto de EŜLI raportis pri la ŝaka kunveno en la Dua ĝenerala kunveno de UEA.

La venonta kunveno de EŜLI okazos en Sofio, en kadro de la 48a UK. Jam nun estas dezirinde, ke ĉiu ŝakisto, kiu partoprenos la 48an, anoncu tion al sekretario de EŜLI por ebligi bonan preparon de la kunveno. Se estos multaj aliĝoj, ni okazigos matĉon kontraŭ iu ŝaka klubo en Sofio.

La 10-an de aŭgusto okazis rapidturniro, kiun partoprenis 8 gesamideanoj (la unuan fojon ludis ankaŭ virino). Tiun turniron sekvis kun intereso multaj kongresanoj, ĉar ĝi okazis sur tre konvena loko, sur balkono de la kongresejo, super la ĝiĉetaro. La turniron gajnis T. Lindberg per 5½ poentoj, sekvata per A. Hvolby (Danlando) kaj P. M. E. Bingen (Nederlando), ankaŭ kun po 5½ p.

La problema konkurso 1962

Nia konkurso gajnis jam firman nombron da partoprenantoj. En tiu ĉi jaro ree estas reprezentataj 27 lan-


doj, do same kiel en 1961. El kelkaj landoj partoprenas pli multaj ŝakistoj kaj nia espero, ke ĝis fino de la jaro ni povos registri pli ol cent partoprenantojn, ŝajnas tute reala. Jen estas la rezultatoj de problemoj, publikitaj en unua duono de la jaro :

problemo n-ro 1 (17) K d8—c7
2 (18) D a6—a8
3 (19) R g5—f 4
4 (20) T f 5—b5

Precipe la problemoj n-ro 2 (18) estis tre malfacila kaj multaj malsukcesis. Venis nur 15 ĝustaj solvoj — kaj preskaŭ duobla kvanto da malĝustaj. Inter tiuj precipe la movoj Te4-el aŭ Da6-b7 estis plej oftaj.

Problemo n-ro 23 (konkurso 1962 — n-ro 7)

O.G. Lauritzen (Kopenhago) — originalo por nia rubriko



Mato en 3 movoj (pro ĝusta solvo 3 poentoj)

Kontrolo : Blanko : Ra3, Db8, Tb6, Kc4, Ĉe4

p. : c5, e2, g3

Nigro : Rd4, Kc8, p.: a4, a5, a6, d5, e3, g4, g5

Solvojn sendu al gvidanto de la rubriko ĝis 28.2.63

DONACOJ POR CED

	£	ŝ	p
Stato je la 6-a de junio 1962	97-	10-	8
S-ro W. H. King, Novzelando	1-	0-	0
S-ino M. Duncan, Aŭstralio	5-	0-	0
N. N. el Aŭstralio	1-	0-	0
S-ino Doris M. Worchester, Britujo	2-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
F-ino Edith E. Mason, Britujo	10-	0	
F-ino Marjorie Boulton, Britujo	2-	0-	0
N. N. Portugalujo	15-	0	
S-ro E. F. Dean, Britujo	4-	0-	0
S-ro L. Belhoste, Francujo	3-	13-	0
Federacio Esperantista de Lancashire kaj Cheshire, Britujo	5-	0-	0
S-ro M. Van Aelst, Belgujo	13-	3	
S-ro J. Vilkki, Finnlando	10-	0-	0
F-ino R. Pedersen, Danlando	10-	6	
S-ro J. Bettger, Germanujo	14-	5	
S-ro W. Hohl, Germanujo	3-	7	
S-ro G. Korth, Germanujo	9-	0	
S-ro Greuter, Svislando	1-	1-	6

La stato je la 12-a de oktobro 1962 141- 0-11

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenas finance ĝian laboron. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

ATENTIGO

Pro la abunda materialo en tiu ĉi numero ne povis esti publikigita la kutima rubriko de CED. Ĝi aperos en la decembra numero.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II SPLIT,
Jugoslavio.

ROMA RENKONTIĜO DE POPOLAJ UNIVERSITATOJ

De la 15-a ĝis la 21-a de Julio en Romo renkontiĝis kursanoj, kiuj dum la pasinta jaro lernis Esperanton en popolaj universitatoj diverslandaj. La ĉeestantoj, plejparte malpli ol dudek-kvinjaraj, kolektiĝis el Aŭstrujo, Belgujo, Danujo, Francujo, Federacia Respubliko Germanujo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Madagaskaro, Norvegujo, Svedujo, Svisujo kaj Venezuelo. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ la prezidanto de la Internacia Unio de Popolaj Universitatoj, la rektoro de la Roma Universitato kaj la komisiito de UNESKO pri popolaj universitatoj.

Dum la tuta semajno regis eksterordinare amika agordo. Kvankam komencantoj, la partoprenantoj sukcesis bone interkompreniĝi, kaj kun uzo de la Internacia Lingvo malaperis ĉiuj diferencoj, kiujn oni kutime sentas komunikante kun eksterlandanoj. Ĉiuj unuanime konkludis, ke per neniuj alia lingvo post tiom mallonga tempo oni povus atingi tiom rimarkindan rezulton.

La tuta tempo estis plene okupita, la programo abundega, sed ĉio bonege funkciis: de loĝigo, manĝado kaj laboro ĝis vizito al vidindaĵoj kaj amuzo. La Mateno estis rezervita por la labora


parto de la programo. Tiam la reprezentantoj de popolaj universitatoj parolis pri laboroj kaj spertoj de siaj institucioj. Posttagmeze oni vizitadis la vidindaĵojn de Romo kaj ĉirkaŭaĵoj kaj vespere en gaja atmosfero la diversnaciaj grupoj prezentis siajn programojn.

Taksante nun la rezultojn de la Roma renkontiĝo ni povas diri, ke ĝi bonege sukcesis, ke ĝi atingis la celon, pro kiu ĝi estis organizita kaj ke ĝi donos novan fortan impulson al por-esperanta laboro en popolaj universitatoj kaj ilia Internacia Unio.

BONEGA INFORMADO

Dum la lasta 18-a IJK en Ystad estis bonega prizorgita la informado de la loka loĝantaro pri la kongreso. La urba gazeto "Ystads Allehanda" konstante ĉiutage aperigis unu pli longan artikolon kun aktualaj fotoj pri la laboro de la TEJO-kongreso. La sama gazeto ankaŭ enhavis dum la tuta kongresa semajno specialan novajangulon *en Esperanto*. La kongresanoj ankaŭ vizitis la redakcejojn kaj la presejojn de "Ystads Allehanda".

S. Z.



Vizito dum la Roma renkontiĝo de Popolaj Universitatoj.

DUM LA JUNULARA FESTIVALO

Dum la 8-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Gestudentoj en Helsinko (28.7.-6.8.) okazis kelkaj Esperanto-aranĝoj: tre bone vizitita Esperanto-ekspozicio, unu kunveno de esperantistoj kaj unu esperantista balo. La kunvenon kaj la balon partoprenis ĉirkaŭ 50 junaj geesperantistoj el 13 landoj, ankaŭ el Brazilo, Madagaskaro kaj Usono. La ambaŭ aranĝojn partoprenis ankaŭ multaj neesperantistoj. Inter la partoprenintoj de la Festivalo estis disdonitaj 6000 poŝtkartoj kun multlingva informa teksto pri Esperanto.

Ĉiuj aranĝoj estis menciitaj en la oficiala programlibro de la Festivalo. La organizan laboron por ĉio supre menciita faris kelkaj gejunuloj-esperantistoj el Helsinko.

S. Z.

LABORBRIGADO KAJ EKSPEDICIA ROTO EN JUGOSLAVIO

En konstruado de la feria centro de sociaj organizaĵoj de Jugoslavio en la meza parto de la lando (Bosnio), partoprenis de la 5-a de aŭg. ĝis la 5-a de sept. ankaŭ la 4-a Esperantista junulara laborbrigado "Stevo Boljević" nombranta 50 gejunulojn el tuta lando. La laborbrigado atingis bonegajn sukcesojn en la laboro kaj ankaŭ en la informado de aliaj gejunuloj pri esperanto.

La Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio iniciatis kaj aŭspiciis 6-membran ekspedician roton, kiu en montaraj regionoj de suda Jugoslavio dum 35 tagoj kolektadis materialojn por kelkaj natursciencaj institucioj. Ĝi ankaŭ faris filmon pri tiuj regionoj kiu estos uzata en la lerneja instruado. Pri la roto kiu startis la 31-an de julio kaj en kiu estis junaj arbarumantoj, skoltoj kaj esperantistoj regule raportis jugoslavia gazetaro kaj radio.

KRUCVORTENIGMO N-RO 3

Alvenis solvoj el 7 landoj, ĉiuj solvoj estis ĝustaj. Koran dankon pro la aktualaj raportoj, kiujn kunsendis la enigmo-amikoj. Bedaŭrinde ne ĉiu sendinto povas esti premiita. Tri libropremioj estas lotumitaj. La gajnintoj:

1. Edo Taddei, Firenze, Italujo.
2. Ilse E. Jalowski, Sao Paulo, Brazilo.
3. Andreo Szabó, Tatabánya, Hungarujo

Mi kore dankas al ĉiuj geamikoj pro la bona kunlaboro kaj pro la multnombraj salutoj el tutmondo kaj petas, sambone helpi al la nova redaktoro de nia junulara paĝo.

Estis vere ĝojo, legi la raportetojn kiujn multaj el Vi sendis kun (aŭ sen) la solvo de la enigmo.

Salutas Vin: Heinrich Reiter

RICEVITA LIBRO

Ferdo Škrljac: BASNICE FABLETOJ. El la kroata trad. Prof. Josip Velebit. Kun ilustraĵoj de Ivan Večenaj. Eld. Osnovna škola Rudeš, Zagreb, 1962. 48p. 16 × 16.5 cm. Prezo: 0,50 us. dol. (7 steloj).

KOREKTOJ

En "Belarto 2", p. 49, aperis grava eraro. En la poemo de Ilio Calabresi, "Laŭlonge de la vojo", la deka verso de la dua parto devus legiĝi: "kaj sub la ĉielo nebarita regno" (anstataŭ "regiono"). Ni pardonpetas al la aŭtoro kaj al ĉiuj legantoj.

En la oktobra numero 1962 de "Esperanto", paĝo 175, dua kolumno, la unua frazo sub la titolo "La Aranĝoj en Helsingør" devus legiĝi "Ĉeestis 150 personoj el 17 landoj" (anstataŭ 15 personoj). Ni pardonpetas al la aranĝintoj kaj legantoj.

PREMIO COMELLA-BASSOLS KVARA KONKURSO

Verdikto

La Juĝanta Komisiono havas la honoron deklari ke la plej alta nombro da poentoj estas atingita de la konkurso PAŬLO LA FETORA kies aŭtoro estas samideano Salvador Gumá, el kataluna urbo Reus (Hispanujo).

La kreinto de la Premio, S-ro Jacint Comella kaj la Juĝantaro gratulas kore la gajninton kaj dankas multe la partoprenintojn pro ilia samideana kunlaboro.

Barcelona-Hispanujo, 1962.

TEO JUNG

EMILIJA LAPENNA

LLUIS MIMÓ

kaj FRANCESC VILÀ - Sekretario

Tra la Mondo

Brazilo

● **Ŝtato Rio Grande do Sul.** En la urbo Candelária funkcias kurso de Esperanto gvidata de Profesoro Wilibaldo Erasmo Kronbauer. Dum unu el la lecionoj oni donacis al Prof. Kronbauer bele enkadrigitan arĝentan karton kun gravuritaj omaĝaj vortoj pro lia pionireco de E-instruado en la regiono.

Bulgarujo

● **Vicprezidanto de Bulgaria Akademio de Sciencoj Akademiano Prof. Vladimir Georgiev,** en intervjuo por "Nuntempa Bulgario", plej forte esprimis sian aprobon de Esperanto. "Esperanto sendube estas necesa", li deklaris. Ni citu krome nur unu el la klarvidaj opinioj de Akad. Prof. Georgiev: "Imagu ekzemple, ke vi estas scienca laboristo en la kampo de kemio. En la mondo oni eldonas pli ol 10.000 sciencajn revuojn pri la problemoj de la kemio en plej diversaj lingvoj. Eĉ la plej bone organizita servo pri sciencaj informoj ne povas garantii la tradukon de la plej gravaj publikaĵoj. Se la scienca informado estus interŝanĝata nur en unu lingvo, la plej facile lernebla, kia Esperanto, tiam multaj valoraj esploroj kaj inventaĵoj estus akireblaj por konsiderinde pli multaj laboristoj en ĉiuj kampoj de la scienco."

Francujo

● **La junular-asocio "Moulins des apprentis"** (muelejoj de metilernantoj), kies sidejo estas en Bonnat (Creuse) favoras esperanton kaj publikigis ilustritan prospekton en L. I.

● **"Nouvelles de Hollande"**, gazeto de la nederlanda ambasadejo — 11 rue de Constantine, Paris 7 — informis pri la 49a U.K. en Hago.

● **Prof. D-ro Seiči Kato, el Matumoto,** restadis plurajn monatojn en Eŭropo. Dum amika intervjuo, la japana okulkuracisto anoncis la reeldonon de sia "lernolibro pri oftalmologio".

● **Plibone ol nenio!** Dum la deka internacia studenta festivalo en Lille, firmao reklamis per slogano "ĉiu, en sia lingvo, kapablas mendi trinkaĵon NN."

● **En Amiens, la Nord-Franca E-federacio** decidis organizi konstantan tradukan konkurson. Unuaj temoj estis: opinio de J. Rostand — Hungara kalkulisto — Plej bona libro-kritiko — turismaj vidindaĵoj en Valencio.

● **I.F.S. en Romans.** 27 ĝis 50 samideanoj, alvenintaj de Aŭstrujo, Britujo, Germanujo, Svedujo k.t.p. kaj de... Francujo partoprenis la 4-an I.F.S. en Romans.

Organizita de loka grupo "Bona Stelo" sub aŭspicio de Departementa Esperantista Federacio, intence al personoj, kiuj pro la dato de la ferio ne povas partopreni mondiskalan Esperanto-Aranĝon, ĝi plene sukcesis, se ni legas la leterojn ricevatajn post la

reveno de la partoprenintoj.

Tri tuttagaj ekskursoj kondukis la karavananojn al mondfama "Vercors", al Antaŭalpoj, al subtera grotego "Aven d'Orgnac".

Urbestroj de Romans, Bourg de Péage, La Chapelle en Vercors, Val-lon Pont d'Arc, fama pro unua tendumejo "Zamenhof" honore akceptis la esperantistajn gastojn.


Tre taŭga aranĝo dank'al Esperanto kaj... bela vetero.

Germanujo

● **Ĉu rekordo?** 2,750,000 ekzempleroj de la horar-libro de Germanaj Federaciaj Fervojoj — enlanda kaj eksterlanda eldonoj — aperis kun pluraj esperantlingvaj paĝoj.

Hispanujo

● **La Hispanan Kongreson de Esperanto en Valladolid** ĉeestis proks. 350 esperantistoj. Dum la Kongreso oni



Esperanta renkontiĝo sub la antikva kastelo "Kost" en ĉeĥa paradizo.

inaŭguris straton "Esperanto" en bela kaj moderna kvartalo.

Hungarujo

● **Okaze de la 50 jara datreveno** de la unua hungara esperanto kongreso la Hungara Esperanto Asocio jubilean kongreson aranĝis la 28-29-an de Julio en Budapeŝto.

Proksimume sepcent kongresanoj aliĝis kaj dekdu alilandaj Esperanto-organizaĵoj — laŭnome: Aŭstrio, Belgujo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Jugoslavio, Norvegujo, Pollando, Rumanujo, Sovetunio, Svedujo kaj Svisujo — estis reprezentitaj en tiu kongreso.

La protektantoj — Stefano KOSSA Ministro de Trafiko kaj Pôsto, Árpád SZAKASITS prezidanto de la Hungara Packonsilantaro, k.a. eminentuloj — per persona ĉeesto honoris la kongreson.

Dum la malferma solenaĵo Árpád SZAKASITS faris la festan parolon. Li parolis pri la bataloj de la pasinto, la ebloj de la nuno kaj perspektivo de la venonto rilate al Esperanto-movado.

Post la eksterlandaj reprezentantoj Julio BAGHY prezidanto de HEA deklame salutis la kongreson. Poste Ludoviko KÖKENY faris rerigardon pri la historio de la hungarlanda Esperanto-movado.

Dum la malferma solenaĵo estis distingitaj per ŝtata ordeno s-anoj Paŭlo BALKÁNYI, Ludoviko KÖKENY, Mici JURÁK-KEKH, Jozefo NAGY kaj Adalberto SAS pro ilia poresperanta agado.

Fine s-ino T. Barbara SZERÉMI vicprezidanto de HEA resumis la venontajn taskojn de la hungara esperantistaro kaj post la kantado de "La Espero" la malferma solenaĵo estis finita.

Arta vespero, laborkunsido, vizitoj al la vidindaĵoj de Budapeŝto plenigis la programon de la kongreso, kiu donis abundan okazon al ĉiuj partoprenintoj por praktiki la internacian lingvon kaj — al la eksterlandanoj — havigi diversajn spertojn rilate al la vivo de la hungara popolo laboranta por paca kunekzisto.

Italujo

● **Dum la 29a Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista** en Romo de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto fondiĝis memstara junularsekcio de IKUE sub la nomo LA ALTA FLUGO.

Svedujo

● **Klubo Esperantista de Skövde** la 8an de septembro festis 30-jaran jubileon. Proksimume 50 personoj ĉeestis la aranĝojn kaj venis salutoj el 13 landoj. Dum la studkonferenco prelegis docento Ebbe Viborg, Göteborg, kaj Lennart Åberg, Skövde.

Usono

● **Duquesne Universitato** estas verŝajne la unua universitato en Usono, kiu proponas Esperanto-kurson en sia oficiala programaro, La profesoro estas Peter J. Franzak.



La libro "Kun la kadavro de l'edzino", kun ĝiaj nacilingvaj eldonoj faritaj pere de la esperanta traduko. Supre, de maldekstre: orientgermana; litva; (nord-)vjetnama; pola; kaj okcidentgermana. Meze, de maldekstre: bulgara; hungara (2 specoj). Sube, maldekstre: japana originalo kaj ĝia resume = la teksto por la esperanta traduko, kiu sidas en la mezo.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Bakker. La 5an de septembro naskiĝis Marc Chaim al s-ro H. Bakker kaj s-ino A. J. Bakker-ten Hagen.

Donat. Al s-ino Louise (filino de Del. kaj HM de UEA, München) kaj s-ro Hans Donat naskiĝis filineto nomita Maria-Irmingard.

Geedziĝoj

Aragones-Chomette. La 14an de septembro geedziĝis denaska esperantistino Lilio Chomette kaj s-ro Sergio Aragones. La familio Chomette loĝas en Los Angeles, Calif., Usono, kaj la familio Aragones loĝas en Meksikio. La novaj geedzoj loĝos en Novjorko.

Schneider-Doneis. F-ino Peggy Doneis kaj s-ro Per Schneider geedziĝis la 31an de aŭgusto 1962. Ilia nova adreso: 2105 Brackenbridge St., Austin 8, Texas, Usono.

Madsen-Ziegler. Juristo Sven Ziegler, estrarano de UEA, edziĝis al Birgitte Madsen la 7an de septembro.

NEKROLOGO

Andrén. La 5an de aprilo forpasis s-ro Helge Andrén, esp. de 1932 kaj membro de la Klubo Esperantista de Malmö.

Beer. Longjara esperantistino (MA de UEA) s-ino Helene Beer en Bayrisch-Gmain mortis dum majo. Ŝi estis amikino de la konata rusa esp.-poeto V. N. Devjatnin.

Carlson. La 25an de aŭgusto en Seattle, Wash., Usono, mortis Ferdinand Carlson, unu el la fondintoj de ELNA kaj iama redaktoro de "North American Esperanto Review".

Fischer. Mortis s-ro Henri Fischer, La Tour de Peilz (Vaud, Svislando, DM de UEA).

Hansson. La 12an de aŭgusto mortis s-ro Hilbert Hansson, ano de la Klubo Esperantista en Malmö ekde 1931.

Östling. La 31an de julio 1962 mortis Georg Östling, Trelleborg, Svedujo, nur 34-jara. Dum la lastaj jaroj li estis UEA-delegito kaj ankaŭ reprezentis la svedan "Eldona Societo Esperanto".

Saville. Mortis s-ro Georgo Saville la 2an de januaro 1962. Li estis esperantisto ekde 1921, kaj tradukis al Esperanto gravajn verkojn: "La fera kalkanumo" de Jack London, "Judoj sen mono" de Michael Gold, "Rigardu la teron" de Van Loon. Li postlasis du prespretajn manuskriptojn: "La historio de la homaro" de Van Loon, kaj "Arrowsmith" de Sinclair Lewis. Inter nefintradukitaj verkoj estas menciinda "La rakonto pri du urboj" de Dickens. Li renkontis sian edzinon en Esp.-klaso en Novjorko kaj edzinigis ŝin antaŭ 41 jaroj. Ŝi ankaŭ flue parolas Esperanton kaj estis granda helpo al la edzo. Ŝia adreso estas: 1039 No. Harper Ave., Hollywood 46, California, Usono.

Wishman. Mortis dum julio 1962 D-ro C. Wishman, Dojeno de la Veterana Esperantista Klubo, do la plej malnova esperantisto en la mondo. Li esperantistiĝis en 1882. Li naskiĝis en 1875 kaj loĝis en Norvegujo.



S O F I O 3-IO VIII 1963

Sub la Alta Protektado de la Bulgara Ĉefministro, Anton Jugov.

Konstanta Adreso: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2

Arta Festivalo:

Rotterdam, la 7-an de oktobro 1962

Por doni kiel eble plej internacian

karakteron al la Dua Internacia Arta Festivalo, la Loka Kongresa Komitato alvokas ĉiujn altkvalitajn teatrajn, folklorajn, muzikajn Esperanto-Ensemblojn sin anonci por partopreno.

La sinanonco, kiu devas laŭ ebleco okazi antaŭ la 30-a de novembro 1962, estu akompanata de ĉiuj necesaj informoj pri la karaktero de la ensemblo, validaj atestoj pri ĝia bona nivelo kaj unu aŭ pluraj fotoj.

La L.K.K. faros sian elekton laŭ sia juĝo kaj laŭ la eblecoj.

La elektita(j) ensemblo(j) ricevos konfirmon plej malfrue la 31-an de decembro 1962.

Propaganda sonbendo:

Ekde la 15-a de novembro estas ricevebla senpage propaganda sonbendo pri la 48-a Universala Kongreso.

Tiu ĉi sonbendo estas farita speciale por Esperanto-Klubo, kiuj bonvolos okazigi "kongresan vesperon" por instigi siajn anojn al partopreno en la

Sofia Kongreso.

Mendoj estas sendendaj al la konstanta adreso de la Kongreso.

Infana Kongreseto:

La 8-a Internacia Infana Kongreseto okazos en la Domo de la Junpioniroj en Sofio. La konstruaĵo troviĝas en la centro de mirinda parko. Informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Statistiko (ĝis la fino de septembro 1962):

Arabio 1, Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 1, Belgujo 2, Brazilo 2, Britujo 17, Bulgarujo 29, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 27, Germanujo 9, Hispanujo 3, Hungarujo 2, Israelo 1, Italujo 8, Japanujo 3, Jugoslavio 13, Nederlando 8, Norvegujo 3, Nov-Zelando 1, Pollando 4, Svedujo 12, Svisujo 2, Usono 2. Entute 164 kongresanoj el 25 landoj.

G. G. Pompilio,

Konstanta Kongresa Sekretario

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 351

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 18.746,32 gld.

S-ro F. Heidler, Germanujo, 7,20 gld.

Entute: 18.753,52 gld.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-jaro!

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1962

453. Pereira, S-ro E. M., Brasília, Brazilo; 454. Brunet, S-ro P., Valenciennes, Francujo; 455. Kings, S-ro W. Alajuela, Kostariko; 456. Pivac, S-ro G. L., Matemata, Nov-Zelando.

POR VASTIGO DE LA AGADO

(Laŭ Estrara letero de 21-5-1962)

S-ino H. C. Cooper, Hobart, Aŭstralio, 50.- gld.; S-ro J. de Oliveira Gama, Juiz de Fora, 37,50 gld.; S-ro E. Pereira Nunes, São Paulo, 15.- gld.; S-ro S. Silva, Resende, 7,50 gld.; S-ro O. Storte, Resende, 7,50 gld.; S-ino E. Vasconcellos, São Paulo, 22,50 gld.; Brazilo; S-ro C. G. Hanson, Teighmouth, 20.- gld.; S-ro G. Marin, Whiteway, 7,50 gld.; S-ino E. E. Mason, Goodrington, Paignton, 10.- gld.; Britujo; S-ro M. Díaz Camacho, Las Palmas, Tenerife, Hispanujo, 7,50; S-ro Budimir, Lyon, 7,50 gld.; S-ro P. Pottier, Blangysur-Bresle, 7,50 gld.; Klubo de Saint-Etienne, 8,25, Francujo; S-ro H. Angstl, Amberg, 9.- gld.; S-ro F. Bläsing, Burgsteinfurt, 9.- gld.; S-ino E. Eichler, Welper (Ruhr), 9.- gld.; S-ro H.-D. Goeres, Moenchengladbach, 9.- gld.; S-ro H. Hommer, Bad Kreuznach, 18.- gld.; S-ino M. Klünder, Burgsteinfurt, 9.- gld.; S-ro W. Klünder, Burgsteinfurt, 9.- gld.; S-ro H. Lachmund, Berlin, 10,80, D-ro C. Renken, Bremen, 9.- gld.; ĉiuj el Germanujo; Dr. Ing.

O. Nanni, 7,50 gld., S-ino F. Polidori, Trieste, 7,50 gld., Italujo; S-ro Nobuo Sakurai, Tokio, 7,50 gld., S-ro C. W. Brandon, Auckland, 10.- gld., S-ino P. De Cleene, Palmerston North, 50.- gld., J. Hamvai, Auckland, 10.- gld., S-ro E. J. Weber, Glen Eden, 7,50 gld., S-ro F. Wise, Gisborne, 18.- gld., Nov-Zelando; S-ro W. McCallum, Edinburgh, Skotlando, 10.- gld.; S-ro A. Blid, Nynäshamn, 6,95 gld., S-ro A. Malmkvist, Stockholm, 6,95 gld., S-ino K. Malmkvist, Stockholm, 6,95 gld.,

NIEUWE BINNENWEG 176

ROTTERDAM-2 — NEDERLANDO

S-ro W. Orre, Sjusnes, 7,50 gld., S-ro H. Petterson, Stockholm, 7,50 gld., Svedujo; S-ro G. Dumont, Muttentz, 8,27 gld., S-ro D. Buhlmann, Langenthal, 8,28 gld., Svislando; S-ro W. H. Gould, Greenfield, Mass., 18.- gld., S-ro H. E. Reed, Mar Vista, Calif., 10.- gld., Usono.

Entute ricevita ĝis 30.9.1962 la sumo de 10.129,35 n.gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

AVERTO - Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Ora geedziĝo. George Gregory kaj Ellen Starr geedziĝis je aŭgusto 24, 1912.

Prelegu per Diapozitivaj: informos: Lentaigne, 3, Gaillarde, Montpellier, Francujo.

Ĉu vi serĉas ian Esperantan libron elĉerpitan? Petu mian libroliston. H. Veenstra, librovendisto. J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam, Nederlando.

S-ro M. Rétot (Adresaro Esperanto-Parolata), Turismaj gvidlibretoj, Eta Interpretisto Franca, Universala Revuo) translokiĝis: 149, Avenue Gambetta, Paris 20e. Poŝtkonto: Paris 1042-07.

Intersteno prosperas. Kontraŭ respond-kupono literaturo: C. Daglio, Litta Parodi, Alessandria, Italujo.

Deziras interŝanĝi 100 grandformatajn

poŝtmarkojn de Nederlando kaj Belgujo kontraŭ samaj el Okcidenta Eŭropo kaj aliaj kontinentoj. Skribu al: Pax Universa, Hofkampstraat 33, Almelo, Nederlando.

S-ro Joseph Hegedus (21 Highbury, Newcastle 2, England) petas belajn, kolorajn brilajn bildkartojn el Okcidenta Germanujo, Svisujo, Aŭstrujo, Usono, Kanado, Ĉinujo, Japanujo, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kun kelkaj skriblinioj Esperante por lia kolekto.

Ned. instruistino, 23 jara, deziras korespondi pri instruado k.ĉ.l. precipe Bulgarujo. Resp. garantiata. Adreso: Toos de Groot, Dr. van Linden Tolstraat 8, Schelluinen (Z-H), Nederlando.

José B. Cordeiro - Brazilo - Kie ajn vi loĝas, skribu al mi laŭ la suba adreso. Plurfoje el Portugalio kaj el Usono mi skribis al vi sub la adreso en S. Paulo, kiun vi al mi donis en Lisbono, sed vi neniam respondis. Ĉu eble vi ne ricevis miajn leterojn? Skribu! Mi estas ĉiam via amiko. Karlo Porespo, 19, Plain Street, Taunton, Mass., Usono.

KREDO FLOROJ DINAMITO

Tri biografiaj rakontoj pri Birgitta, sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo de la floroj, fondinto de la moderna botanika scienco, kaj pri Nobel, la industriulo kaj inventinto de la dinamito, kiu tamen ankaŭ iniciatis la nobelpremiojn. La libro estas originale verkita en Esperanto de la juna sveda fizikisto kaj instruisto d-ro Ernst Olsson. Redaktis G. Henriksson.

La zorge kaj plaĉe redaktita libro bonega prezentas, kiel oni povas majstri Esperanton eĉ pri sciencaj studoj. Laŭ mia opinio ĝi meritis, ke ĝi estu vaste aĉetata kaj legata. (El recenzo en Germana Esperanto-Revuo.)

80 paĝoj. Broŝ. 3.50 gld. Bind. 6.25 gld.

MALSATA ŜTONO

de Rabindranath Tagore

Tradukis el la bengala lingvo L. Sinha.

Ilustraĵoj de Sukhamoy Mitra.

La sep rakontoj kondukas la leganton en veran hindan atmosferon, foje fean kaj fantazian, kun la nebulaj pentraĵoj de revo kaj sonĝo, foje realecan, kun la premo de la lando kaj de la klimato (la pluvsezono, la riveroj), kun la peno de la homoj, la laboro de la vilaĝanoj, la fremdeco de la kasto.

(El recenzo en Heroldo).

La verko estas libro n-ro 1 en la Serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de UEA.

128 paĝoj. Broŝ. 8.50 gld. Bind. 11.50 gld.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO Malmö 7

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.

PACAMANTOJ !

Memoru antaŭmendi la periodaĵon "NOVA MONDO", samtempe sendante 2 : — sv. kr. aŭ egalvaloron por la kostoj. — Estas tre grave ke ĝi aperu ! Unika kaj gravega artikolaro jam anoncita ! — Cetere vidu la anoncon en la aprila numero de "Esperanto".

Adr.: Gunnar Rugland, ĉe Rönnell, Hornsgatan 89II, Stockholm Sv., Svedujo.

Oni ankaŭ povas mendi la periodaĵon, kaj ni poste enkasigos la monon.

ERNA

Jus aperis ĉarmega infanlibreto

KION ERNA TRAVIVIS EN PINURBO

Rakonto por junaj naturamantaj infanoj.
Verkis originale en Esperanto

Bep Slösser-Bresler

Eldonis I.K.U.E.

Prezo : 1,50 gld. 6 steloj

Mendu ĉe U.E.A. !

UNESCO COURIER

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O.

**publikigis en sia numero de decembro
1959 grandan artikolon pri Zamenhof**

Tiu numero en angla, franca, hispana aŭ rusa lingvo estas ricevebla ĉe la landaj U.N.E.S.C.O.-instancoj kaj ĉe U.E.A.

Montrinda al ĉiuj neesperantistoj

Prezo : inkl. sendkostojn : 0,50 gld; 2 steloj.

Mendante, indiku la deziratan lingvon !

Krome, riceveblaj ĉe U.E.A.

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanto-teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESKO Prezo : 4 int. resp. kuponoj aŭ egalvaloro por la tuta serio.

La 10-a de decembro: Tago de la Homaj Rajtoj

EN LA REGIONO DE RAVA VALO DE LOIRE,

proksime de historiaj kasteloj, naturaj kaj
arkeologiaj vidindaĵoj

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo GRESILLON — BAUGÉ (M.&L.) Francujo

PLANIS POR 1963

Dum la Paska Libertempo

Dum la somero, en kvin periodoj, de la 30-a de
JUNIO, ĝis la 15a de Septembro

Agrablajn renkontojn kaj restadojn

kun kulturaj aranĝoj aŭ diversgradaj kursoj,
gvidataj ekskursoj, distraĵoj kaj kulturaj vesperoj.

Aparte alloga estas la dua periodo :

Alventago la 13a de JULIO, forirtago la 27a de
JULIO

INTERNACIAJ KULTURAJ kaj TURISMAJ FERIOJ kun eminentaj prelegistoj

Por detalaj informoj, kaj aliĝoj, sin turni al la
supra adreso

Antaŭ la 30a. de Junio, estas eble akcepti grupojn
por pli malpli longaj periodoj.

LA ORGANO DE LA INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA ESTAS

espero katolika

fondita en 1903

24-paĝa, ilustrita monata revuo kun aktuala enhavo.
Ĝi enhavas aldone ĉiun duan monaton almenaŭ 8
paĝojn el la Sankta Skribo, kun komento, tiel ke oni
povas kolekti tiujn aldonojn por poste bindigi ilin.
Jarkotizo : ned.gld. 6,— + 1,— por la bibliaj aldonoj.
Ĉiu katolika Esperantisto estu membro de I.K.U.E.
resp. abonanto de ESPERO KATOLIKA.

Petu provekzempleron ĉe la Centra Oficejo de
I.K.U.E.

Frederikstraat 2, Dordrecht (Nederlando)

Poŝtkonto: no. 214009 je la nomo de f-ino Durenkamp

Petu provnumeron !

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan
revuon "Vojo Vero Vivo".

Adreso : **Internacia Katolika Informejo,**
Gasthuisstraat 68, TILBURG, Nederlando

La plej ofte aperinta

La plej rapide informanta

Esperanto-gazeto

HEROLDO

DE ESPERANTO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Aktuala filmkolono
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

jarabono : 4 \$ (53,3 steloj)

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio : **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**

Redaktorino : Ada Fighiera-Sikorska

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam